

„Informilo por Interlingvistoj“ (IpI) 16-a jaro (2007), n-roj 61-62
(2-3/2007). Petu IpI senpage de Centra Oficejo de UEA.
Redaktas: Detlev Blanke (dblanke-gil@snafu.de).

Enhavo

	Enhavo	1
1	La Premio Cassandra Pyle al <i>Humphrey Tonkin</i>	3
1.1	La premio	3
1.2.	Parolado okaze de ricevo de la Premio (<i>Humphrey Tonkin</i>).....	3
2	Pasintaj aranĝoj	5
2.1	Konferenco en Sheffield pri soveta lingvo-teorioj.....	5
2.2	Konferenco pri propedeŭtiko en Moskvo	5
2.3	Internacia interdisciplina konferenco en Kaunas	6
2.4	Prelegoj pri bibliotekoj en Dobřichovice kaj Hamburg.....	7
3	Estontaj aranĝoj 2007	7
3.1	Esperantologia konferenco en Jokohama	7
3.2	La 5-a Nitobe-simpozio en Tokio.....	7
3.3	Kolokvoj pri bibliotekoj.....	8
3.3.1	En Vieno pri planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj.....	8
3.3.2	Pribibliotekaj aranĝoj ankaŭ en Budapeŝto kaj Milano?	9
4	Bibliotekoj, katalogoj kaj bibliografioj	9
4.1	Jam mil Esperanto-fotoj en „Bildarchiv Austria“	9
4.2	Skanado de unikaĵoj en Vieno.....	10
4.3	La Saksa Esperanto-Biblioteko	10
4.4	Rusa literaturo en Esperanto.....	10
4.5	Faka literaturo en usona bibliografio de MLA.....	11
4.6	Bibliografioj kaj katalogoj en la reto	11
5	Publicaĵoj.....	12
5.1	„Svisa Enciklopedio Planlingva“ de <i>Andreas Künzli</i> (<i>Detlev Blanke</i>)	12
5.2	Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto de <i>Erich-Dieter-Krause</i> (<i>Detlev Blanke</i>)	14
5.2.1	Ĝisnunaj vortaroj de Krause.....	14
5.2.2	La Granda Vortaro Germana-Esperanto.....	15
5.3	Pri lingvoj en la reto: la libro pri KAEST 2006.....	16
5.4	„The Cambridge Encyclopedia of Language“ (<i>David Crystal</i>)	20
5.5	Geheimsprachen (<i>Fred B. Wrixon</i>).....	20
5.6	Studoj de <i>Ivo Bratanov</i> el Bulgario.....	21
5.7	Giuseppe Peano kaj L. Couturat – korespondaĵoj (<i>Carlo Minnaja</i>).	21

5.8	Romano kun Esperanto kaj Zamenhof (<i>Dagmar Leupold</i>).....	22
6	<i>Noam Chomsky</i> pri Esperanto kaj plurlingvismo.....	22
7	Interlingvistiko en universitatoj	24
7.1	„Esplorunu interlingvistiko“ en Poznań (<i>Alicja Sakaguchi</i>).....	24
7.2	Disertacio Tolomeo	24
7.3	Interlingvistika prelego en la universitato de Kazan (<i>A. Mel'nikov</i>). 24	
7.4	Interlingvistika seminario en Varese (<i>Federico Gobbo</i>).....	24
7.5	Slavistika konferenco en Humboldt-Universitato (Berlin) kun Esperanto (<i>Jouko Lindstedt</i>)	26
8	Pri interlingvistiko en la reto	26
8.1	Polimetrika: Anglaj superrigardoj pri la objekto de interlingvistiko.....	26
8.1.1	<i>LIU Haitao</i>	26
8.1.2	<i>Detlev Blanke</i>	26
8.1.3	<i>Richard Kennaway</i>	27
8.1.4	<i>Frank Nuessel</i>	27
8.1.5	<i>Frank Esterhill</i>	27
8.2	Reta esperantologia revuo „Lingva Kritiko“.....	27
8.3	Informoj de la Akademio de Esperanto en la reto	28
8.4	<i>George Dalgarno</i>	29
8.5	Terminologiaj materialoj de <i>Bernhard Pabst</i> kaj <i>Rüdiger Eichholz</i> . 29	
8.5.1	La bulteno Terminoteko (1991-1996) de <i>Bernhard Pabst</i>	29
8.5.2	Materialoj de <i>Rüdiger Eichholz</i>	29
9	Revuoj.....	30
9.1	„Rivista Italiana di Esperanto“ – forgesita esperantologia revuo (<i>Reinhard Haupenthal</i>).....	30
9.1.1	Artikoloj	30
9.1.2	Recenzoj.....	30
9.2	Interlingvistiko en “La Ondo de Esperanto“.....	31
10	KOD – ĉu ideala interlingvo? (<i>Rudolf Fischer</i>)	31
11	Personoj	32
11.1	Habilitiĝo de <i>Klaus Schubert</i>	32
11.2	<i>Viktor Petrovič Grigor'ev</i> (1925-2007).....	33
11.3	Honorigo por <i>Fabrizio Angelo Pennacchietti</i>	34
12	Pola radio daŭrigas	36

1 La Premio Cassandra Pyle al Humphrey Tonkin

1.1 La premio

Nur lastatempe ni aŭdis pri aljuĝo de la prestiĝa Premio Cassandra Pyle por la jaro 2006 al doktoro Humphrey Tonkin, kiu i.a. ankaŭ estas la direktoro de CED (CED eldonas IpI).

La Premio kiel neesperantista ĵetas lumon al la multflanka profesia kaj honorofica laboro de la premiito, kio ofte ne estas sufiĉe konata. Pro tio IpI ne nur publikigas la informojn pri la distingo sed ankaŭ la dankparoladon de Tonkin.

La usona Premio Cassandra Pyle, kiun Tonkin ricevis 23.5.2006 en Montrealo, ĉiujare estas aljuĝata al homo, kiu ludis gvidan rolon en internaciaj interŝanĝoj je tutmonda skalo. Por esti konsiderata por la premio, proponato devas havi multjaran sperton, okupante gvidajn poziciojn en organizaĵoj kaj institucioj kun signifa rolo en internacia eduka interŝanĝo, subtenante junajn profesiulojn, faciligante kaj stimulante kunlaboron inter individuoj kaj organizaĵoj, kaj ekzemplante “paciencon, toleron, optimismon kaj bonan volon.”

La organizaĵo NAFSA (<http://www.nafsa.org/about.sec>), kiu aljuĝas la premion, estas la ĉefa usona profesia organizaĵo de tiuj, kiuj gvidas internaciajn fakojn en universitatoj, prizorgas eksterlandajn studentojn kaj sciencistojn, aranĝas eksterlandan studadon por usonaj studentoj k.s NASFA (Association of International Educators) havas pli ol 9000 membrojn en 3500 usonaj institucioj kaj reprezentejojn en 84 landoj.

Dum sia kariero d-ro Tonkin estis prezidanto de du universitatoj kaj gvidis la estrarojn de pluraj naciaj organizaĵoj pri internacia edukado. Dum kelkaj jaroj li estris la Konsilion por Internacia Eduka Interŝanĝo, la nacian organizaĵon, kiu administras la registaran programon Fulbright por interŝanĝo de sciencistoj inter Usono kaj aliaj landoj. Poste li prezidis la Komisionon Fulbright en Kanado. Li ankaŭ prezidis la Usonian Forumon por Internacia Edukado, unu el la ĉefaj pledantoj por internacia edukado en elementaj kaj mezaj lernejoj – same ankaŭ la Internacian Partnerecon por Servo-Lernado, kiu sendas studentojn eksterlanden por kombini studadon kun civila servado.

Aldoniĝas ankoraŭ tuta serio da organizaĵoj, en kies estraroj li laboris aŭ laboras. Li ankaŭ abunde verkis pri internacia edukado en usonaj universitatoj, pri lernado de fremdaj lingvoj, kaj, kompreneble, pri lingvaj problemoj.

Kiel konate, ne malplej grave, li plenumis naŭ jarojn kiel prezidanto de UEA – de 1974 ĝis 1980 kaj denove inter 1986 kaj 1989 – kaj egalan nombron da jaroj kiel estrarano en aliaj funkcioj. Ni ne scias ĝis kiu grado lia agado en la Esperanto-movado ludis rolon en lia selekto, sed certe tiu rolo ne estis nula.¹ (Pri la biografio kaj publicaĵoj de Humphrey Tonkin vidu en: IntI Nr. 52-53, p. 4-15).

1.2 Parolado okaze de ricevo de la Premio

Humphrey Tonkin

Mi estas tre danka al la estraro de NAFSA kaj al ties ĉefdirektoro *Marlene Johnson* pro tio, ke ili honoris min per la Premio Cassandra Pyle. Mi estas nur reprezentanto de tia laboro, kian multaj anoj de NAFSA faras: multaj aliaj povus stari ĉi tie hodiaŭ anstataŭ mi. Estas grave paŭzi de tempo al tempo por konsideri la sindediĉon kaj konvinkon ebligantajn la laboro de internacia edukado: premioj kiel la nuna donas al ni tiun okazon.

Grandan honoron mi sentas, ke mi staras ĉi tie apud tiu granda internaciisto, demokrato kaj medioprotektanto *Wangari Maathai* – kolego-estrarano de World Learning (Tutmonda Lernado).

¹ Mi dankas al Stano Marĉek, kiu disponigis al mi la elektronikan tekston (laŭ la revuo Esperanto (6/2007, p. 123, kie tamen nur aperis la lasta alineo de la parolado de Tonkin, tiu kun la mencio de Esperanto– DB).

Kaj, ĉefe, mi sentas min honorata, ke mi ricevis premion, kiu portas la nomon de *Cassie Pyle*, kolegino, kiun mi bone konis tra multaj jaroj, ĉe la Konsilio por Interŝanĝo de Universitatoj kaj ĉe la Kanada Komisiono Fulbright – kaj ankaŭ ĉe NAFSA. Cassie estis unu el la plej grandaj internaciistoj el ĉiuj – grandioza administranto kaj gvidanto: homo, kiu kombinis flekseblon kaj dignon kun solide firmaj valoroj, sed homo, kiu, malfeliĉe, forlasis nin multe tro frue.

Kvankam mia hodiaŭa temo estas Usono, mi ankaŭ ĝojas ricevi tiun ĉi premion en Kanado. Kaptu la okazon dum tiu ĉi konferenco por esplori superan edukadon en Kanado. Ĝi povas multon instrui al ni usonanoj.

Estus kliŝe atentigi, ke miloj da gvidantoj de aliaj landoj iam studis en Usono kaj ke la universitata kaj scienca mondo estas preskaŭ dominata de homoj produktitaj de usonaj postdiplomaj fakultatoj. Usona supera edukado pli multon faris tra la mondo por antaŭenigi la malferman interŝanĝon de ideoj kaj la efikan intelektan kunlaboron ol eble iu ajn alia sektoro de la usona vivo. Ni estas multrilate la arkitektoj de la paca internacia komunumo, kiu fariĝis domina en tiel multa serioza internacia dialogado.

Estus same kliŝe rimarkigi ke pli kaj pli multaj junaj usonanoj elektas studi eksterlande. La pintaj rangoj de niaj firmaoj, la membraro de la Usona Kongreso, miloj da profesiuloj kaj komercistoj studis eksterlande en la pasinta trideko da jaroj sub nia egido. Hodiaŭ, ĉiam pli multaj homoj kuraĝas vojaĝi al nekutimaj partoj de la mondo, por realigi engaĝitajn studojn, kiuj tute malsimilas pasivan rigardadon de la pentraĵoj de Luvro aŭ vizitadon de la Reĝa Ŝekspira Teatro en Stratfordo – agadoj en si mem tamen admirindaj. Pli kaj pli ofte, niaj gejunuloj praktikas servo-lernadon en Azio kaj Afriko, esplorprojektojn en Latinameriko, aŭ studlaborojn en Eŭropo aŭ Orienta Azio. Fakte, ne sufiĉas studi eksterlande: eksterlandan studadon devas akompani eksterlanda komprenado – la kapablo rigardi nin mem en la spegulo portata de niaj samspecianoj en aliaj landoj.

Ĉio ĉi ne okazus sen la laboro de profesiaj administrantoj, kiuj faciligas tiajn interŝanĝojn, helpas garantii ilian kvaliton, prizorgas la ĉiam pli komplikajn interŝanĝajn regulojn, kreas programojn por helpi eksterlandajn vizitantojn al Usono, kaj asignas niajn gejunulojn al programoj de eksterlanda studado.

Oni povus racie supozi, ke la plimultiĝo de tiu internacia trafiko nature rezultigus pli grandan komprenon pri la cetero de la mondo, kaj pli grandan toleradon de ĝiaj diferencoj. Sed tio ne okazas inter ni – aŭ, pli specife, la reago de tiuj, kiuj estas malpli bone informitaj, aŭ malpli kuraĝaj, montriĝas potenca kaj koroda. Spite la internacian trafikon, hodiaŭ oni tro ofte faradas politikajn decidojn ne surbaze de kultura komprenado sed surbaze de enlanda politika kalkulado, ne surbaze de la faktoj sed surbaze de naiva fantazio, ne surbaze de reciproka respekto sed sur la supozo, ke aliuloj estas iel mankaj kompare kun usonanoj, ke aliaj religioj ol la propra meritas malpli da respekto, ke oni povas defendi la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn en nia konstitucio nur per rifuzado de tiuj fundamentaj rajtoj kaj liberecoj al aliaj personoj, ke la angla lingvo kaj nur la angla lingvo alirigas onin al tiuj rajtoj, ke scio pri la mondo estas signo de malforto, ne de forto, ĉar ĝi igas nin heziti antaŭ ol moviĝi al konfrontiĝo.

Verdire, ne sufiĉas simple fari unu-du vojaĝetojn eksterlanden, lerni balbuti fremdan lingvon, aŭ koni la mondon nur sufiĉe por povi citi statistikojn montrantajn, ke Usono estas unua en la mondo en tiu aŭ alia atingokategorio. Nek sufiĉas aŭskulti nur tiujn alilandanojn, kiuj eĥas tion, kion ni diras al ili. Ni devas trovi vojojn al komunikado kun aliuloj surbaze de egaleco; ni devas lerni fari demandojn kaj ne nur liveri respondojn; ni devas lerni flekseblon kaj ne nur firmecon; ni devas lerni aŭskulti kaj ne nur paroli.

Pro tio, tra la jaroj, mi pledadas por lernado de fremdaj lingvoj. Pro tio, kiam mi havis dekkvinon da jaroj, mi lernis Esperanton kaj travojaĝis la mondon utiligante ĝin por paroli kun homoj, kiuj ne scipovis paroli usone aŭ brite. Pro tio, mi ĉiam instigis kaj instigas homojn taksi lingvojn ne kiel rigidajn sistemojn sed kiel formojn de homa konduto. Pro tio mi pledis por studado de antropologio

samgrade kiel studado de ekonomiko. Pro tio mi laboris por la programo Fulbright. Pro tio mi ĉiam apogas eksterlandan studadon de speco, kiu preteriras la normojn, kiel ilin preteriras la programoj de SIT kaj la Internacia Partnereco por Servo-lernado [programoj de studenta interŝanĝo]. Pro tio mi laboras por antaŭenigi Unuiĝintajn Naciojn kaj la principojn entenatajn en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Sed ankaŭ vi faris tiujn aferojn, aŭ aferojn similajn. Restas tiom da farenaĵoj. Kaj sekve ni devas labori kune.

Ree mi dankas la estraron de NAFSA. Mi deziras al ĉiuj NAFSA-anoj energion, fortecon kaj kuraĝon en la laboro por tio, kion ili tiel forte kredas. Neniam antaŭe internacia edukado kaj internacia interŝanĝo gravis tiel multe kiel ili gravas hodiaŭ; neniam la laboro de NAFSA estis pli esenca ol hodiaŭ.

La angla originalo de la parolado troviĝas ĉe:

http://www.nafsa.org/about.sec/leadership_recognition/cassandra_pyle_award/cassandra_pyle_recipients/humphrey_tonkin_acceptance.

2 Pasintaj aranĝoj

2.1 Konferenco en Sheffield pri sovetiaj lingvo-teorioj

De 9.-11. Septembro 2006 en la universitato de Sheffield/Britio okazis dulingva (en la angla kaj rusa) pri sovetiaj lingvo-teorioj. Kelkaj prelegoj estis aparte interesaj sub interlingvistika aspekto, ĉar ili helpas kompreni la pozicion de Esperanto en Sovetio en la 1920-aj jaroj (ŝtata subteno) ĝis la persekutoj (aparte draste ekde 1935/36).

Ni menciuj:

Kapitolina Federova (European University at St. Petersburg, Russia): Language as a Battlefield: Class Struggle in Language and Linguistics.

Yukiyasu ARAI (Hokkaido University, Japan): Language Policy for Making a Language.

Michael G. Smith (Purdue University, USA): Stalin and the Politics of Language Intervention.

Aleksandr D. Dulichenko (University of Tartu): Ideja meĝdunarodnogo iskusstvenogo jazyka v debrjach rannej sovetskoj sociolingvistiki (The idea of an artificial international language in the labyrinths of early Soviet sociolinguistics).

Sébastien Moret (University of Lausanne, Switzerland): Some Attempts of Rationalizing the Russian Language in the USSR of the 1920s.

Valerii Gretschno (Tokyo University, Japan): Meĝdu utopej i „Realpolitik“: vopros o vsemirnom jazyke v lingvo-politiĉeskom kontekste 1920-30-ch gg. (Between utopia and „Realpolitik“: the problem of a global language in the linguistic and political context of the 1920s and 30s).

Oni planas eldoni la aktojn de la konferenco.

2.2 Konferenco pri propedeŭtiko en Moskvo

La 13-an de aprilo 2007 en la ejoj de la Rusia Akademio pri Klerigo en Moskvo okazis internacia konferenco „Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj“. Partoprenis 48 personoj el 7 landoj (Germanio, Hungario, Japanio, Nederlando, Rusio, Ukrainio, Hungario, Usono). La konferencon organizis „Eŭropa Jurscienca Universitato Justo.“ (EUJ) sub la gvido de sia rektoro *prof. d-ro Genadij Ŝilo*. EUJ estas privata universitato, kiu kunlaboras kun Akademio

Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS, fondita laŭ iniciato de *prof. d-ro Helmar Frank*). La konferenco rekomendis per rezolucio al la Rusia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco enkonduki Esperanton en la lernejojn. (Vidu la ampleksan artikolon kaj la tekston de la rezolucio en Esperanto 6/2007, p. 124-125).

2.3 Internacia interdisciplina konferenco en Kaunas

La 18an kaj 19-an de majo, 2007 en Kaunas/Litovio, okazis la internacia interfaka scienca konferenco FIHUSO 2007. Partoprenis la konferencon fakuloj pri fizikaj, humanismaj kaj sociaj sciencoj. La konferencon organizis la humanisma fakultato de Vilniusa universitato en Kaunas.

La konferencon partoprenis 204 personoj el 33 landoj. Okazis plenkunsido kaj kunsidoj en la kvin sekcioj informadiko, lingvistiko kaj literaturo, interlingvistiko, ekonomiko kaj entreprenado.

La konferenco estis tre vasta kaj diversflanka, kaj Esperanto kaj esperantistoj havis grandan rolon en ĝi. Verŝajne estas la unua fojo en la mondo, kiam en ĝenerala scienca konferenco tiom multe da atento estis dediĉita al Esperanto kaj al prelegoj en Esperanto.

Okazis efika informado pri Esperanto. En la scienca komitato de la konferenco eniris ses famaj esperantistoj: *Humphrey Tonkin*, *Renato Corsetti*, *Geraldo Mattos*, *Balazs Wacha*, *Wim Jansen* kaj *Aleksandr Duliĉenko*. En la listo de partoprenantoj estis 21 esperantistoj el 16 landoj.

La honora prezidanto de la scienca komitato de la konferenco estis *Reinhard Selten* el Germanio. Inter la ĉefparolantoj de la konferenco en la plenkunsido estis kvin esperantistoj. Ĉiuj ili, same kiel la aliaj esperantistoj, faris siajn prelegojn dufoje - unufoje en la angla aŭ litova lingvo, kaj duan fojon en Esperanto, en la interlingvistika sekcio.

Estas eldonita 180-paĝa konferenca libro kun informoj kaj resumoj de la prelegoj. La prelegoj de la esperantistoj estas resumitaj en tri lingvoj (la angla, Esperanto, la litova), ĉiuj aliaj prelegoj estas resumitaj nur en la angla.

[Laŭ informo de Litova Esperanto-Asocio]

Retejo de la konferenco:

http://www.vukhf.lt/?url=/lietuviskas/fakulteto_darbai/konferencijos/fihuso2007

Oni prezentis jenajn prelegojn²:

Reinhard Selten (Germanio): La distribuo de lingvaj spertoj kiel ludoteoria ekvilibro (Distribution of Language Experience as a Game-Theory Equilibrium)

Michael Cwik (Belgio): How to Achieve Non-Discrimination in Inter-Ethnic, InterCultural and International Communication in the Long Run? A Long-Term Strategy to Overcome Language Discrimination (Ripeto de la prelego en Esperanto: Kiamaniere intertempe atingi nediskriminacion en interetna, interkultura kaj internacia komunikado? Longdaŭra strategio dediĉita por eviti lingvan diskriminacion.)

Heiner Eichner (Aŭstrio): On the "Unknown Language" (Lingua Ignota) Created by the German Abbess Hildegard of Bingen (12th Century) (en Esperanto: Pri la "nekonata lingvo" (lingua ignota) far la germana abatino Hildegardis de Bingen).

Carlo Minnaja, Laura Gilda Paccagnella (Italio): A Mathematical Dictionary for Esperanto According to Wordnet (Esperanto: Matematika vortaro por Esperanto laŭ la strukturo de Wordnet)

Madis Linnamägi (Estonio): Estilo as a Language Project of Hans Kõöp (en Esperanto: Estilo — lingva projekto de Hans Kõöp).

Věra Barandovská-Frank (Germanio): Lingvistiko en interfaka perspektivo: hobiolingvistiko (Linguistics in an Interdisciplinary Perspective: Hobby Linguistics).

² Mi dankas al *Aida Čižikaitė* pro la informoj pri la programo.

Aida Čižikaitė (Litovio): Gramatinis laiko raiškos aspektas esperanto kalboje (Time Expression in Terms of Grammar in the Esperanto).

2.4 Prelegoj pri bibliotekoj en Dobřichovice kaj en Hamburgo

En la kadroj de la Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (10.-12.11.2006), KAEST (vdipu en ĉi tiu kajero 5.3) kaj la 84-a Germana Esperanto-Kongreso (25.-28.5.2007, Hamburgo) *Detlev Blanke* prelegis pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj. La skizo de la prelego en Hamburgo troviĝas ĉe:

www.nigra-kato.de/GEK2007/materialoj/GEK2007-Detlev%20Blanke-konservi%20nian%20spiritan%20heredajhon.pdf

3 Estontaj aranĝoj 2007

3.1 Esperantologia konferenco en Jokohama

Estas jam tradicio, ke en la kadro de Universala Kongreso okazas esperantologia konferenco. Ĝi celas esti forumo por la diskonigo de esploroj en interlingvistiko kaj esperantologio; ĝi ne volas servi nur al interŝanĝo inter fakuloj, sed estas direktita ankaŭ al la esperantista publiko. Restas ankoraŭ multo por esplori pri internacia lingva komunikado, pri planlingvoj kaj – aparte – pri Esperanto kun ĝia komunumo por havi pli bonan, science bazitan fundamenton por niaj klopodoj kaj argumentoj.

La temo de la esperantologia konferenco kadre de la UK en Jokohamo estas “Aziaj kontribuoj al esperantologio”. Ni aparte invitas japanojn, ĉinojn kaj koreojn anonci sin kaj proponi la ĝisnunan rezulton de siaj studoj pri lingvaj, literaturaj kaj movad-historiaj aspektoj de Esperanto.

Se via aktuala esploro ne havas rektan rilaton al la ĉeftemo de la ĉi-jara esperantologia konferenco kaj vi tamen volas nun proponi referaĵon pri ĝi, bonvolu konsiliĝi kun ni.

Bonvenaj estas ankaŭ junaj esplorantoj, kies magistriĝa aŭ doktoriĝa tezo teme rilatas al Esperanto aŭ interlingvistiko.

Ni planas eldoni la aktojn de la konferenco. La Estraro de CED, kiu aŭspicias la konferencon, inter la altkvalitaj kontribuoj elektos la plej bonan por eventuala aperigo en la socilingvistika revuo *Language Problems and Language Planning*.

Interesatoj sin anoncu ĉe d-ro Ulrich Lins (u.lins@gmx.net).

3.2 La 5-a Nitobe-simpozio en Tokio

La Nitobe-Simpozio portas la nomon de *Nitobe Inazo* (1862-1933), Ĝenerala Sub-Sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu strebis al lingva egaleco kaj lingva justeco en tiu organizaĵo. La unua Nitobe-Simpozio okazis en Prago en 1996. Postaj simpozioj okazis en Berlino (1999), Pekino (2004) kaj Vilno (2005).

La Kvina Nitobe-Simpozio, okazos la 2-an kaj 3-an de Aŭgusto 2007 en Tokio.

La kadra temo estas:

Eŭropaj lingvoj kaj aziaj nacioj: pasinteco, politiko, potencialo

Celo. En la procezo de moderniĝo en Azio, eŭrop(deven)aj lingvoj rolis ŝlosile. Unuflanke eŭropaj lingvoj servis kiel instrumento de koloniisma regado, aliflanke ili estis bonvenigitaj kiel iloj por la enkonduko de modernaj teknikoj kaj ideoj el okcidento. Nun, post kelkcent jaroj, kelkaj eŭropaj lingvoj enradikiĝis en aziaj landoj, aliaj lingvoj perdis siajn antaŭajn gvidajn poziciojn, sed daŭre tenas sian lokon en la socio. Eŭropaj lingvoj, precipe la angla, do iĝis parto de la azia historio kaj integra parto de la azia nuno.

La simpozio celas prilumi la rolon kaj perspektivon de la jam enradikiĝintaj eŭropdevenaj lingvoj en Azio. Ĝi plue levos la demandon, kiugrade en lingvopolitiko la vortoj ‘okcidenta’ kaj ‘tutmonda’ estas sinonimoj. Ĉu tutmondiĝo havas ankaŭ unike azian aspekton? Ĉu la aziaj lingvoj povas ludi

internacian lingvopolitikan rolon? Ĉu eblas formuli specife azian lingvan politikon, aŭ ĉu ĉiu lando simple iru sian propran vojon?

Priraktaj temoj:

Kiel eŭropaj lingvoj influis kaj daŭre influas la komunikadon en Azio? Kiuj kampoj de la vivo plej multe dependas de ili; kiuj kampoj plej multe uzas aziajn lingvojn? Kiajn konsekvencojn por azianoj kaj aziaj socioj havas tiu nuna lingva sistemo, en kiu eŭropaj kaj aziaj lingvoj dividas inter si diversajn funkciojn (komunikadon, kulturon, identecon, politikon)? Ĉu eŭropaj lingvoj kontribuas nur al tutmondiĝo, aŭ ankaŭ al evoluo de naciaj aŭ regionaj identecoj. Kiel ili influas la kulturen evoluon? Kies posedaĵo estas tiuj lingvoj? Kiomgrade aziaj popoloj alproprigis al si tiujn lingvojn? Ĉu konstateblas kresko de la internaciskala (regiona aŭ monda) signifo de iuj aziaj lingvoj? Kio estas la estonteco de la angla lingvo en Azio? Kian rolon ĝi ludas en la diversaj landoj? Kiuj faktoroj influos ĝian pluan disvastiĝon kaj enradikiĝon? Kiuj aliaj eŭropaj lingvoj havas signifan rolon en Azio? Kiuj principoj devus gvidi realisman nacian aŭ internacian lingvopolitikon en Azio? Kiun lokon la diversaj eŭropaj kaj aziaj lingvoj okupu en la eduka sistemo? Ĉu lingvopolitikaj modeloj aliloke en la mondo aplikeblas al Azio (ekzemple, eŭropa plurlingvismo, svisa plurlingvismo, kanada dulingvismo)?

Programo. La programo konsistos el prelegoj de invititaj prelegantoj, prezentoj de formalaj referaĵoj de invititoj, kaj ĝenerala debato kaj diskutado.

Lingvoj. Interpretado estos disponebla en la japana, angla kaj Esperanto

Organizado. La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvoproblemoj (CED) kaj la Eŭropa Instituto de la Sophia-Universitato respondecos pri la organizado de la simpozio, kune kun Japana Esperanto-Instituto. CED instigas esploron, instruadon kaj publikigon pri internaciaj lingvaj demandoj kaj eldonas la sciencajn revuon Language Problems & Language Planning (Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado).

Aktoj. Estas planate publikigi la aktojn de la simpozio.

Informoj pri la simpozio: <http://www.info.sophia.ac.jp/g-areas/nitobe2007.htm>

Pri detaloj bonvolu kontakti:

Europa Instituto, Sophia-Universitato, Kioi 7-1, 102-8554 Tokio, Japanio

Tel. +81-(0)3-3238-4341, retpoŝte: nitobe2007@gmail.com

(Ni raportos en la sekva numero de IpI pri la rezultoj de la simpozio – Red.)

3.3 Kolokvoj pri bibliotekoj

3.3.1 En Vieno pri planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj

Nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la Internacia Esperanto-Muzeo de Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, aranĝos internacian kolokvon en Esperanto sub la temo

“Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj”.

La kolokvo okazos la 19-an kaj 20-an de oktobro 2007 sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperantomuzeo (Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum der Österreichischen Nationalbibliothek, Palais Mollard, Herrengasse A-1010 Wien).

La celo de la kolokvo estas, prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj. Jen la enhavo de la antaŭvidita programo:

- prezento de la aktuala situacio de IEMW
- informoj pri gravaj bibliotekoj kaj arkivoj

- utiligo kaj diskonigo de la riĉaĵoj de la kolektoj
- problemoj de la modernigo de la kolektoj, i.a. per la utiligo de novaj teknologioj

La reciproka konatiĝo de la koncernaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon.

Programskemo:

19-a de oktobro: Malfermo (9h00), faka programo, komuna vespero

20-a de oktobro: Daŭrigo de la faka programo ĝis vespero

Kotizo: 45 €, reduktite 30 € ; por prelegantoj kompreneble senkosta

La teknikajn aferojn de la restado (tranoktoj ktp.) solvos ĉiu partoprenonto mem.

Sondado de la bezonoj

Interesatoj estas invitataj, respondi kelkajn demandojn, kiuj povas tre utili por la preparo de la aranĝo:

1. Krom la prezento de unuopaj gravaj bibliotekoj, kiuj temoj laŭ vi estu nepre pritraktotaj dum la kolokvo?
2. Kiuj estas la plej gravaj problemoj, kun kiuj vi baraktas en via laboro lige al biblioteko aŭ/kaj arkivo?
3. Sur kiu tereno laŭ vi necesus kaj eblus kunlaboro kaj povus frukti pozitivaj rezultoj? Kiujn konkretajn paŝojn vi proponas por realigi tiun kunlaboron?
4. Se vi konas retadresojn de bibliotekoj kaj arkivoj (kaj/ aŭ de iliaj katalogoj), bv. ilin noti:
5. Kiujn kompetentajn koleg(in)ojn laŭ vi ni informu pri la kolokvo? Bv. doni, se eble, la retadreson.

Provizoran aliĝilon kaj informojn oni ricevas ĉe la respondeculo de la aranĝo:

Mag. Herbert Mayer esperanto@onb.ac.at.

Tel.: 01/534 10-731 und -730

Poŝta adreso:

Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 308, A-1015 Wien

3.3.2 Pribibliotekaj aranĝoj ankaŭ en Budapeŝto kaj Milano?

Laŭ „Heroldo de Esperanto“ (5/2007) la Esperanta Civito ankaŭ planas aranĝojn pri bibliotekoj, nome en Budapeŝto (18.10. 2007) kaj Milano (15.10. 2007). Mankas precizaj informoj.

4 Bibliotekoj, katalogoj, bibliografioj

4.1 Jam mil Esperanto-fotoj en „Bildarchiv Austria“

La Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko lanĉis kunlaboron kun la „Bildarchiv Austria“ kaj komencis katalogigi kaj skani siajn 30.000 fotojn kaj 10.000 aliajn objektojn kun Esperanta temo. Ĝus eniris tiun daten-bankon la mila foto, la unuaj objektoj sekvos en la venontaj semajnoj.

Kion tio signifas? Tio signifas, ke ekde nun tiuj skanaĵoj estas alireblaj kaj videblaj en interreto. En la sekvaj jaroj enlaboriĝos ĉiuj fotoj, aliaj bildobjektoj kaj Esperantaĵoj en la posedo de la Esperantomuzeo: desegnoj, pentraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, steloj, ŝildoj kun Esperanta surskribo...

Tiel la mondscale plej granda arkivo kun Esperanto-bildoj kaj -objektoj estas je la dispono de ĉiuj. Eblas ankaŭ deŝuti la skanaĵojn – tute senkoste en meza kvalito kaj kun ioma krompago en altega

kvalito. Tio estas granda oferto ne nur por la diversaj Esperanto-revuoj, kiuj serĉas historiajn bildojn, sed ankaŭ por sciencistoj, kolektantoj kaj la simpla samideano.

La priskriba lingvo de la “Bildarchiv Austria” estas la germana. Eblas serĉi per la vorto “Esperanto” kaj aldona vorto: Ekzemple per la serĉvortoj “Esperanto” kaj “Wien” vi ricevas bildojn de Esperanto-okazaĵoj en Vieno. Aranĝojn oni povas trovi ankaŭ laŭ la Esperanta nomo: “universala” ekz. kondukos vin al ĉiuj fotoj de la Universalaj Kongresoj.

La “Bildarchiv Austria” organizas ankaŭ malgrandajn virtualajn ekspoziciojn. Ĝus enretiĝis la unua: “Esperanto zwischen 1918 und 1938” (Esperanto inter 1918 kaj 1938) kun kompreneble emfazo de Aŭstrio. Pro la fakto ke “Bildarchiv Austria” estas unu el la plej grandaj bild-daten-bankoj en Eŭropo, tiuj ekspozicioj pri Esperanto havos ankaŭ tre gravan varban efikon.

Alvoko: Gesamideanoj, garantiu, ke viaj historiaj Esperanto-fotoj kaj -dokumentoj ne perdiĝu! Sendu ilin al la Esperantomuzeo, kiu dece kaj konvene konservos ilin por futuraj generacioj. Jen la adreso:

Esperantomuseum, Nationalbibliothek

Postfach 308

A-1015 WIEN / Vieno

La retadreso de “Bildarchiv Austria”:

<http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx>

La retadreso de la Esperantomuzeo:

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>

Herbert Mayer

4.2 Skanado de unikaĵoj en Vieno

Kadre de programo de cifereca storado de Aŭstria Nacia Biblioteko estas storataj iom post iom ankaŭ la materialoj de la Planlingva Kolekto en Vieno.

Unue oni skanas la publikaĵojn de 1887-1900, t.n. fruaj publikaĵoj, kiuj ofte estas tre valoraj, ĉar malofte aŭ nur unufoje troveblaj.

Jen la aliro al la reto:

En Esperanto: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm>

En la Germana: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

4.3 La Saksa Esperanto-Biblioteko

La Saksan Esperanto-Bibliotekon gvidas *d-ro. Benoît Philippe* (Pillnitzer Landstr. 25, 01326 Dresden, Glizje@aol.com). La biblioteko aktuale havas ĉirkaŭ 4000 volumojn.

Aperis jenaj katalogoj

Philippe, Benoît (2001, Red.): Alphabetischer Katalog der Sächsischen Esperanto-Bibliothek. I. Band. Alfabeto katalogo de la Saksa Esperanto-Biblioteko. I. volumo. Dresden: Sächsische Esperanto-Bibliothek, 89 p.

Philippe, Benoît (2007, Red.): Alphabetischer Katalog der Sächsischen Esperanto-Bibliothek. II. Band. Alfabeto katalogo de la Saksa Esperanto-Biblioteko. II. volumo. Dresden: Sächsische Esperanto-Bibliothek, 80 p.

4.4 Rusa literaturo en Esperanto

Estas ĝisdatigita kaj ampleksigita la bibliografia listo “Rusa literaturo en Esperanto”. Ĝi estas kompilata surbaze de la materialo, konservata en la Kolektiva Esperanta Biblioteko (Jekaterinburg-Krasnojarsk, Ruslando) kaj en la Biblioteko de La Ondo de Esperanto (Kaliningrado, Ruslando).

Unue, estas traktataj tradukoj el gazetoj, kies kompletajn kolektojn ni havas. Ni ne uzis la ekzistantajn bibliografiojn pro multaj eraroj (precipe en la bibliografio de Davidov, kiun senkontrole uzis kelkaj postaj esplorantoj). Nun la listo enhavas tradukojn el la rusa beletro, kiuj aperis en: “Espero” (kompleta), “[La] Esperantisto” (kompleta), “La Nica Literatura Revuo” (kompleta), “La Ondo de Esperanto” (1909–1917; 1991–2006), “Literatura Mondo” (Tria periodo, 1947–1949), “Literatura Skatolo” (1984–1987), “Por la Paco” (kompleta), “Sezonoj” (kompleta), “Scienco kaj Kulturo” (1995–1998). Entute estas registritaj iom pli ol 400 tradukoj. La laboro daŭros. Ni volonte akceptos mankantajn gazetojn. Konsultu la liston ĉe: <http://www.esperanto.org/Ondo/Bibl-rus.htm>

4.5 Faka literaturo en la usona bibliografio de MLA

La usona *International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures*. New York, eldonita de *Modern Language Association of America (MLA)* estas la plej grava perioda bibliografio por interlingvistikaj kaj esperantologiaj studoj.

Interlingvistikaj rubrikoj aperadas ekde 1960, sub diversaj nomoj:

1960 - 1967: International languages (sub General language and linguistics),
 1968 - 1973: Interlinguistics (sub Composite and derivative languages, other communicative behavior),
 1974 - 1980: International languages,
 1981 - 1982: International languages. Auxiliary languages,
 ekde 1983: Auxiliary languages. International languages

La kunlaborantoj de la interlingvistikaj rubrikoj estis W. A. Verloren van Themaat (1979-1989), Humphrey Tonkin (1980 - , nun ĉefbibliografo), Jane Edwards (1984-1998) kaj Detlev Blanke (1992-).

Por la jaroj 2002 – 2006 Humphrey Tonkin donis jenajn informojn (retmesaĝo de 21.1.2007):

Jaro	artikoloj en revuoj	libroj	nacia literaturo (tradukoj)	ĝenerala literaturo	sume
2002	262	105	21	1	289
2003	104	44	33	4	185
2004	265	185	30	4	448
2005	231	136	23	0	414

4.6 Bibliografioj kaj katalogoj en la reto

Mankas preciza superrigardo pri katalogoj kaj bibliografioj en la reto. Tamen jen sekvu kelkaj:

- (1) Vikipedio : <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-biblioteko>
- (2) Virtuala Esperanto-Biblioteko de Martin Weichert: www.esperanto.net/veb/ (ne daŭrigata)
- (3) Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno: “Katalogo Trovanto”:
<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>
- (4) Centre de documentation et d’étude sur la langue internationale (CDELI),
La Chaux-de-Fonds: <http://opacrbnj.rero.ch/gateway>
- (5) Germana Esperanto-Biblioteko (Aalen): <http://esperanto-bibliothek.de.nr/>
- (6) Brita Esperanto-Biblioteko Butler (Barlastono): www.biblbut.org
- (7) Nacia Itala Esperanto-Biblioteko: (www.doktoresperanto.it)
- (8) Biblioteko William Auld (nun en la Skota Nacia Biblioteko)
<http://www.nls.uk/collections/rarebooks/news/>
- (9) Esperanto-Kolekto de Karóly Fajszki en la Hungara Fremdlingva Biblioteko (Budapest):
www.oik.hu

- (10) Biblioteko Hector Hodler (UEA, Rotterdam): www.uea.org/kiu/biblioteko.html,
www.uea.org/dokumentoj/bhh/reta_muzeo.html
- (11) Biblioteko de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (GDREA), nun troviĝanta en la Federacia Ŝtata Arkivo de Germanio (parto pri GDR, SAPMO)
http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm

(Bv. sendi pluajn temrilatajn informojn – La red.)

5 Publicaĵoj

5.1 Fenomeno: „La Svisa Enciklopedio Planlingva“ de *Andreas Künzli*

Aperis vere giganta kaj unika enciklopedio, kiu entenas ĉion pri la planlingva movado en difinita lando:

Künzli, Andreas (2006): Universalaj Lingvoj en Svislando. Svisa Enciklopedio Planlingva. Schweizer Plansprachen-Lexikon. Encyclopédie suisse des langues planifiées. Enciclopedia svizzera delle lingue pianificate (Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua). La Chaux-de-Fonds: SES (Svisa Esperanto-Societo) et CDELI (Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale), Bibliothèque de la Ville de La Chaux-de-Fonds. ISBN 2-9700425-2-5, 1129 S. (multaj ilustraĵoj, kelkaj koloraj), Preis 60 EUR.

1 Laŭ historia aspekto Svislando verŝajne apartenas al tiuj regionoj, kiuj pro la enŝtata lingva reĝimo (kvar oficialaj lingvoj) okazis aparta kompreno pri la lingvo-komunika problemoj. Sekve en Svisio dum la jardekoj evoluis viglaj diversplanlingvaj movadoj. En Svisio ne nur Esperanto ludis grandan rolon, sed ankaŭ aliaj planlingvoj tie trovis siajn pionirojn.

2 La aŭtoro :

Andreas Künzli (*1962) studis slavistikon kaj orienteŭropan historion, krome internacian juron, en la universitato de Zuriko. Li finis siajn studojn per licencia (magistra) verkaĵo pri la historio de interlingvistiko kaj Esperanto en la Cara Imperio kaj en Sovetunio.

Li nun laboras en la kampo de informadiko, gvidas i.a. la retejon www.plansprachen.ch. Li estas aktiva esperantisto ekde 1979 kaj laboris en diversaj funkcioj.

3 La enciklopedio ne nur estas eksterordinara depono de scio sed samtempe monumento por unu el la plej gravaj planlingvaj arkivoj en tutmonda skalo, se ne la plej grava. Temas pri *CDELI* (*Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale*), kies fondinto kaj honorofica arkivisto, Claude Gaconde, estas same omaĝata per tiu ĉi verko. CDELI enhavas preskaŭ la kompletajn materialojn de Volapük, Ido, Occidental-Interlingue kaj Interlingua. Kompreneble la plej granda parto rilatas al Esperanto. La enciklopedion financis la tri supre menciitaj institucioj, kiuj funkcias kvazaŭ kiel eldonejoj, krome sponsoris *Claude kaj Andrée Gacond* kaj *André Sandoz-Giroud*. La libron Künzli dediĉas al siaj gepatroj, tre simpatia gesto.

4 La enhavtabelo (p. 3-14) donas bonan superrigardon pri la strukturo de la verko.

Prefacoj (15-37, ĉi tie aparte gravas informoj pri la principoj de la ellaborado de la enciklopedio (25-34); *interlingvistikaj enkondukoj* en la germana, franca, itala, angla, kaj rumanĉa (*Andreas Künzli, Claude Gacond, Claude Piron, Tazio Carlevaro, Arthur Baur*, 39-146), Volapük (147-182), Esperanto (183-790), Ido (791-851), Occidental-Interlingue (853-866), Interlingua (867-912), diversaj aliaj projektoj kaj interlingvistikaj-esperantologiaj kontribuoj (913-973), kronologio de la planlingva movado en Svisio (975-997), resumoj kaj provizoraj konkludoj (998-1005), fontidokoj (1007-1036), bibliografio de la interlingvistika literaturo, aperinta en Svisio resp. verkoj de svissaj aŭtoroj (1039-1062), listo de publicaĵoj de *Andreas Künzli* (1063-1066), bibliografio de la planlingvaj revuoj, aperintaj en Svisio (1067-1082), indekso de la personoj kun biografioj en la enciklopedio (1083-1095), gramatika kaj leksika ŝlosiloj de Esperanto por la franca kaj germana lingvoj (1097-1129).

La ĉefa lingvo de la enciklopedio estas Esperanto. Tamen diversaj dokumentoj ankaŭ aperas en aliaj lingvoj.

5 La strukturo de la ĉefaj ĉapitroj pri la unuopaj planlingvoj. La unua enkondukita artikolo prezentas la historion de difinita planlingvo en Svisio (ekz. „*Volapük en Svislando*“, 149-155), riĉe ilustrita. Al la unuopaj planlingvaj ĉapitroj apartenas vico da alfabeto ordigitaj biografioj de planlingvaj aktivuloj (ekz. de la svisa volapükisto *Jakob Spengler* [*1872 - †1951], 156-157) kaj aliaj pritemaj eseoj (ekz. „*Zamenhof pri Volapük kaj Schleyer*“, 157-159). Ene de la ĉefaj ĉapitroj troviĝas „antologioj“. Temas pri gravaj, parte klasikaj eseoj, por la interesatoj aliloke malfacile troveblaj, ekz. „*Volapük – die Weltsprache*“ (1888) de *G. Schmidt* kiel represo el la revuo „*Volapükafren jvezik* [svisa amiko de Volapuko], St. Gallen 1888) kun paralela traduko en Esperanto, sekvas artikolo de *Otto Stoll* en Volapük kaj la germana.

6 La paĝo-kvantoj, dediĉitaj al la unuopaj planlingvoj montras, ke en la enciklopedio ĉefrolas Esperanto (Volapük: 55 p., Esperanto: 637 p., Ido: 60 p., Occidental-Interlingue: 12 p., Interlingua: 45 p.). Tio estas reflektado de la reala planlingva situacio.

La ĉapitro pri Esperanto:

Post la enkondukita eseo (Esperanto en Svislando, 185-202) sekvas 113 biografioj (La listo troviĝas en la enhavtabelo, entute Künzli mencias 500 personojn en sia verko). Ĉi tiuj biografioj donas interesan respondon al la demando, kiuj kaj kiaj homoj okupiĝis/-as pri Esperanto. Samtempe la aŭtoro aprezas ilian movad-organizan kaj fakan kontribuojn al lingvo kaj lingvo-komunumo. Multaj nomoj, konataj al interlingvistoj, ricevas profilon, fariĝas pli vivaj per teksto, foto kaj donitaj kontribuoj. Jam la ellaborado de tiuj biografioj estas granda kaj aprezinda fortostreĉo.

Aldoniĝas artikoloj pri la Esperanto-movado en unuopaj regionoj aŭ urboj (Appenzell, Argovio, Bazelo, Berno, La Chaux-de-Fonds, Friburgo, Grizono, Ĝenevo ktp.). Aliaj artikoloj informas pri fakaj, religiaj aŭ alie orientitaj grupoj (Bahaanoj, Bibliotekoj kaj Ekspozicioj, Blinduloj, Bon-templanoj, Civilservo Internacia, Civito Esperanta, Familioj Esperantistaj, Fervojistoj, Filatelo, Gastejo Edmond Privat, Gazetaro Nacilingva ktp.).

En la verko troviĝas multegaj nigraj-blankaj fotoj (verŝajne kelkaj centoj) kaj inter la paĝoj 548 kaj 549 26 aldone reproduktitaj fotoj (parte koloraj) sur aparte bonkvalita papero.

La konsulton de la verko faciligas, ke la artikoloj estas interligitaj per atentigoj.

Alfabeto listo de la biografie prezentitaj personoj troviĝas ĉe la fino de la libro, bedaŭrinde sen paĝindiko. Ili devintus esti enirintaj en personindekson, kiu ankaŭ enhavu listigon de tiuj personoj menciitaj dise tra la verko. En la lasta fazo de la finpretigo de la verkego al la aŭtoro verŝajne mankis la forto. Sed li aŭ alia persono nepre devus ellabori tian indekson.

7 En la libro troviĝas 11 kunligitaj sed aparte presitaj esearoj (antologioj) kun entute 40 gravaj interlingvistikaj eseoj, aparte de svisaj aŭtoroj, sed ne nur (ekz. ankaŭ de *Julio Baghy*, *Wilhelm Ostwald* [en la germana kaj Ido] kaj *L. L. Zamenhof*). Temas pri ofte ne tre konataj aŭ malfacile alireblaj tekstoj, signifaj por interlingvistiko (i.a. de *Arthur Baur*, *Ric Berger*, *Pierre Bovet*, *Tazio Carlevaro*, *Auguste Forel*, *Claude Gacond*, *Fritz Haas*, *Hector Hodler*, *Ernest Naville*, *Edmond Privat*, *Gonzague de Reynold*, *André Schild*, *Eduard Schwyzer*). La tekstoj aperas en la originalo (en la lingvoj angla, franca, germana, krome en Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua). Ĉiu teksto havas esperantlingvan enkondukon. Ne estas klare, kial la tekstoj estas dissemnitaj tra la libro. Ili facile povus formi iun memstaran antologion, kvazaŭ anekso.

8 La bibliografia parto montras, ke la multaj biografioj kaj detaloj pri la svisa planlingva movado baziĝas je solidaj esploroj. Al nekonantoj de Esperanto la orientiĝon helpas gramatika kaj leksika ŝlosiloj kun tradukoj en la franca kaj germana.

La tuta libro estas solide bindita, presita sur bonkvalita papero kaj havas plaĉan kovrilon.

9 Tia enciklopedio estu kompletigata de tempo al tempo. La aŭtoro ŝajne tion planas. Por tio disponeblas lia bonega kaj enhance tre riĉa retejo www.plansprachen.ch (kun sama enhavo: www.planlingvoj.ch). Ankaŭ kompletigaj kajeroj estas imageblaj.

10 En la konkluda parto Andreas Künzli i.a. skribas:

„En sia historia dilemo inter revo kaj realo la esperantistoj kaj planlingvanoj ankoraŭ longan tempon devos resti grandaj idealistoj.“ (1005).

Li certe pravas. Tamen, la modelo planlingvo funkcias. Kaj ke ĝi funkcias ankaŭ dankindas en konsiderinda amplekso al Svisio. Ĉu la modelo iam ludos pli grandan rolon en internacia kadro dependas unuavice de politikaj-ekonomiaj faktoroj.

Andreas Künzli sendube apartenas al tiuj „grandaj idealistoj“ kaj meritas nian dankon kaj aprezon pro sia nekutima verko. Per ĝi li digne eniris en la historion de interlingvistiko.

5.2 „Große Wörterbuch Deutsch-Esperanto“ de Erich-Dieter Krause

5.2.1 Ĝisnunaj vortaroj de Krause

Ekzistas kelkaj bonaj Esperanto-vortaroj por germanoj. (Pri tio mi verkis detalan eseon aliloke: Blanke 2006, S. 249-286). Sed la profesian nivelon en la germanan leksikografion de Esperanto enkondukis la specialisto pri la indonezia lingvo ĉe la universitato Leipzig, *Erich-Dieter Krause*.³ Lia *Taschenwörterbuch* (poŝvortaro) *Esperanto-Deutsch* (1967, aperinta en la ŝtata fremdlingva eldonejo de GDR, Verlag Enzyklopädie Leipzig), ĝis 1985 atingis kvin eldonojn (Krause 1985) kaj estis disvastigita en ĉiuj germanlingvaj ŝtatoj kaj krome inter alilandaj esperantistoj, scipovantaj la germanan.

En la jaro 1971 Krause publikigis sian *Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto*, kiu aperis en la sama eldonejo kaj ĝis 1989 atingis kvar eldonojn (Krause 1989). Ambaŭ poŝvortaroj entenis proksimume po 12 000 leksemojn.

Respondante al granda bezono en 1983 Krause publikigis novan vortaron Germana-Esperanto, kiu apartenas al la kategorio de mezaj vortaroj, kun ĉirkaŭ 40.000 leksikaj unuoj (Krause 1983). La eldonejo *Langenscheidt* kunigis la du poŝvortarojn kaj eldonis ilin kiel *kompaktvortaron Kompakt-Wörterbuch* (Krause 1995). La meza vortaro Germana-Esperanto reaperis ĉe Langenscheidt (Krause 1993)., tamen nur kun tre limigitaj korektoj kaj kompletigoj. Tiun striktan limigon postulis la eldonejo Ĉar la eldonejo Langenscheidt unuavice estas profite orientita entrepreno ĝi ne interesiĝis pri pluaj leksikografiaj projektoj de Esperanto.

Alian strategion feliĉe havas la eldonejo *Helmut Buske en Hamburgo*, inter lingvistoj tre renoma. Ĝi evidente volas subteni malpli grandajn lingvojn. Pro tio Krause povis aperi en 1999 sian *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* (Granda vortaro Esperanto-Germana), kiu entenas proksimume 80.000 leksikajn unuojn (artikolvortoj kaj parolturnoj). Laŭ mia takso ĝi entenas proksimume 22 000 radikvortojn. Aldoniĝas kunmetaĵoj kaj parolturnoj. Kompare al tio la *Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (NPIV)*, entenas 16.780 radikvortojn kaj 46.890 kunmetaĵojn. (Waringhien/Duc Goninaz 2005: 33)

Pro tio la menciita vortaro de Krause (1999) estis la ĝis tiam plej ampleksa vortaro de la tipo etno-lingvo-Esperanto.

³ Li estis ĝis 2000 profesoro pri indonezia lingvo ĉe la universitato de Leipzig. *E.-D. Krause* ne nur estas la plej renoma germana leksikografo por Esperanto sed ankaŭ aŭtoro de grandaj vortaroj kaj lerniloj por la indonezia lingvo. Ili lastatempe aperis ankaŭ en la eldonejo Helmut Buske, Hamburgo.

5.2.2 La Granda Vortaro Germana-Esperanto

Kun sia nova vortaro Krause superas siajn antaŭajn verkojn laŭ la amplekso.

Krause, Erich-Dieter (2007): Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Hamburg: Helmut Buske Verlag, 1679 p., 170x240 mm, ISBN 978-3-87548-466-3, (ĝis 30.6.07: 98 EUR, ekde 1.7.07: 128 EUR)

Sen detala analizo kaj kelktempa uzo ne eblas verki adekvatan recenzon pri tia vortaro. Pro tio mi limigas min al kelkaj rimarkoj. La vortarego laŭ la eldoneja informo enhavas proksimume 160.000 artikolvortojn kaj parolturnojn. Ĝi redonas la plej grandan parton de la *ĉiutaga leksiko*. „Kompleta“ ĝi ne povas esti. Neniu vortaro povas esti kompleta, des pli ne, ĉar ofte malfacilas klare difini la limojn de tio, kio estas la „ĉiutaga lingvo“. Estus interese ekscii, laŭ kiuj kriterioj la aŭtoro elektis la germanan eliran leksikon. Ke la elekto estas larĝa kaj trafa, jam montras supraĵa trafolumado. Ĝi ne povas esti kompleta. Ĉiam restos iuj neplenumitaj deziroj... ĉe ĉiu ajn vortaro.

La vortaro ne nur donas la lingvaĵon de ĉiutaga uzo, sed ankaŭ multajn *fakajn nociojn*. Tio tre utilas pro la pli kaj pli grava rolo, kiun scienco kaj tekniko ludas en la ĉiutaga vivo. Ĉe la leksiko el botaniko, zoologio kaj medicino la aŭtor donis latinajn terminojn. Tio bonvenas, ĉar en tiuj medioj ekzistas certaj diskutoj.

Salutindas la konsidero de la *lingvo-uzo de Aŭstrio*. Ni ja scias, kiom strikte la siatempe nova lando en Eŭropa Unio postulis respekti siajn lingvajn specialaĵojn por tradukado kaj interpretado.

Geografiaj nomoj, tikla kaj arde diskutata problemo ekde la fruaj tempoj de Esperanto, troviĝas abunde en la vortarego. Problemon eble prezentos la strikta limigo al la pseŭdosufikso *-i-* ĉe landnomoj. Ja ekzistas adepto de *-uj-o* eĉ en la Akademio de Esperanto. *Germani/o* aŭ *German/ujo*? Mankas atentigo pri tio, kvankam la preferata tipo laŭ mi ja estas tiu je *-i-*, des pli ĉar *-uj-* estas plursignifa.

Malsame al la Granda Vortaro Esperanto-Germana, kie Krause surprize ignoris *virinajn nomojn*, ili ja troviĝas en la nov vortaro. Komprenoble ankaŭ tiu temo dum jardekoj estas multe diskutata.

La vortaro enhavas ankaŭ multajn *mallongigojn*. Ĝenerale ili estas prezentataj kun la germana plena formo, la esperanta mallongigo kaj la esperanta ekvivalento (ekz. *DDR* – Deutsche Demokratische Republik, *GDR* - Germana Demokratia Respubliko), sed ne ĉiam. Ĉe NATO ni nur trovas la anglan plenan formon, nek la german nek la esperantan.

Sub *GIL* ni trovas la germanan plenan formon „Gesellschaft für Interlinguistik“, sed mankas mankas la plena esperanta formo. Ĝin ni trovas ĉe Interlinguistik (interlingvistiko) kiel *Societo por Interlingvistiko* (kvankam la internacie kutima formo estas: *pri* Interlingvistiko).

Al mi ŝajnas, ke por multaj germanaj kunmetaĵoj la aŭtoro preferas klarigajn tradukojn en Esperanto ankaŭ tie, kie kunmetaĵoj estas tute kutimaj:

Bauabschnitt: *etapo de konstruado* (mankas *konstruetapo*);

Brieföffner: *malfermilo por leteroj* (mankas *letermalfermilo*);

Brigadier: *estro de [labor]brigado* (mankas *brigadestro*);

Brillenetui: *ujo por [la] okulvitroj* (mankas *okulvitrujo*) ktp.

Komprenoble, ĉi tiu analiza tipo estas motivebla kaj prezentas avantaĝojn aparte por komencantoj. La sperta lingvo-uzanto, konante la regulojn de la vortformado, preferos kunmetaĵojn, jam pro lingva ekonomio.

Estus interese ekscii, kiujn neologismojn la aŭtoro proponas. Tio eĉ necesus, ĉar la vortaro sendube influos la lingvo-uzon de germanaj uzantoj.

La dulingvaj uzo-instrukcioj estas klaraj (15 artikoloj). Pli ol 250 mallongigoj kaj atentigoj pri faka uzo faciligas la orientiĝon. La aŭtoro sekvis (la nur iom reformitan) t.n. „novan“ germanan ortografion. Tre bonvenas la kompostformato.

La vortarego estas rezulto de 40-jara leksikografia laboro de la aŭtoro. Iom orientiĝante pri la internacia leksikografio de Esperanto oni povas aserti, ke ĝis nun ne ekzistas pli ampleksa vortaro etnolingvo-Esperanto. Iom kompareblajn aktualajn projektojn mi ne konas.

Certe, eĉ tia grandega vortaro ne povas plenumi ĉies dezirojn, des pli, ĉar temas pri verko de unu sola aŭtoro. Tiom ampleksaj vortaroj ĝenerale ellaboriĝas de kelkpersonaj alte pagataj teamoj..., almenaŭ ekster Esperantio. Do oni devas admiri la enormajn intelektajn, tempajn kaj fizikajn fortostreĉojn de Erich-Dieter Krause.

La voratro aperis kvazaŭ jubileo, 120 jarojn post la publikigo de la Unua Libro. Ĝi estas brila pruvo pri tio, ke la lingvo de Zamenhof disponas pri riĉaj esprimiloj, fakto pri kio foje lingvistoj ne konscias, se ili aŭdacas paroli pri „artefarita lingvo“ sen kulturo.

Ĉi tiun verkon devus posedi ĉiu germanlingva esperantisto, eĉ se li/ŝi supozas, ke por la kutima lingvo-uzo sufiĉas la aliaj menciitaj vortaroj

Detlev Blanke

Literaturo

Blanke, Detlev (2006): Zweisprachige Lexikographie mit Esperanto – unter besonderer Berücksichtigung des Deutschen. En: Blanke, D.: Interlinguistische Beiträge. Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen. Herausgegeben von Sabine Fiedler. Frankfurt am Main ktp...: Peter Lang. Europäischer Verlag der Wissenschaften, p. 249-286.

Krause, Erich-Dieter (1984): Taschenwörterbuch Esperanto-Deutsch. Leipzig: Verlag Enzyklopädie. 5. korektita eldono..

—(1989): Taschenwörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie, 4. korektita eldono

—(1983): Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Leipzig: Verlag Enzyklopädie.

—(1993): Wörterbuch Deutsch-Esperanto. Frankfurt/Main: Langenscheidt; korektita kaj iom ampleksigita eldono de Krause 1983.

—(1995): Kompaktwörterbuch Esperanto (Esperanto-Deutsch, Deutsch-Esperanto). Frankfurt/Main Langenscheidt.

—(1999): Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Hamburg: Helmut Buske.

Waringhien, Gaston/Duc Goninaz, Michel (Hrsg.)(2005): La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda (2-a korektita eldono).

5.3 Pri lingvoj en la reto: la libro pri KAEST 2006

KAEST estas la mallongigo por Kolokvo pri Apliko de Eesperanto en Scienco kaj Tekniko, serio de altnivelaj fakaj aranĝoj, kiujn ĉiun duan jaron organizas *d-ro Petr Chrdle* kun sia entrepreno KAVA-PECH en Dobřichovice ĉe Prago. Aperis la volumo kun la prelegoj de la jam kvina kolokvo, kiu okazis 10.-12.11.2006.

Pluhař, Zdeněk (2007, Hrsg.): Lingvo kaj Interreto kaj aliaj studoj. Dobřichovice: KAVA-PECH, 134 p. (Kun resumoj en la lingvoj germana, franca, ĉeĥa kaj Esperanto).

3 S

5.4 The Cambridge Encyclopedia of Language

Inter la manlibroj pri lingvoj, tradukitaj en diversajn lingvojn, tiu de David Crystal certe estas unu el la plej interesaj. Multaj bonegaj ilustraĵoj estas bone uzablaj por prelegoj. La angla originalo estis:

Crystal, David (1987) „The Cambridge Encyclopedia of Language“. Cambridge University Press (Cambridge, New York, Melbourne. En 1997 aperis la dua eldono.

Intertempe aperis diverslingvaj tradukoj, inter ili ankaŭ la germana:

Crystal, David (1993): Die Cambridge Enzyklopädie der Sprache (Übersetzung und Bearbeitung der deutschen Ausgabe von Stefan Röhrich, Ariane Böckler und Manfred Jansen). Frankfurt/Main, New York : Campus, 478 p. (multaj ilustraĵoj kaj tabeloj)

Por la interlingvismo aparte interesa estas la ĉapitro X (Lingvoj de la mondo) kun jenaj subĉapitroj:

- Sprachbarriere (lingva bariero)
- Übersetzen und Dolmetschen (tradukado kaj interpretado)
- Künstliche Sprachen (artefaritaj lingvoj)
- Weltsprachen (mondlingvoj)
- Mehrsprachigkeit (plurlingveco)
- Sprachplanung (lingvoplanado)
- Fremdsprachenunterricht (instruado de fremdaj lingvoj)
- Zweckgebundene Sprachen (specialaj lingvoj, ekz. faklingvoj)

Kiel informis nin la hungara interlingvisto Wacha Balász, ankaŭ aperis hungara traduko:

Crystal, David (2003): A nyelv enciklopédiá. Budapest: Osiris, 619 p.

Wacha komentas:

„Por la hungara eldono Péter SIPTÁR redaktis apartan bibliografion de la hungarlingva fakliteraturo.

Mi mem havis la eblon helpi per kolekto de konvena bibliografia materialo pri planlingvoj kaj lingvopolitiko.

La bibliografio havas dek unu subĉapitrojn, la deka (X.) subĉapitro estas tiu, kiu enhavas ankaŭ la nomojn por ni (esperantistoj, hungaroj, hungaraj esperantistoj) konatajn, ekz. tiujn de Antal L., Baghy, Bartha Cs., Bujdosó, Büky, Csiszár (Ada, Ernő), Deme, Ertl, Éder, Fajszí, Fodor, Gados, Gergely, Gönz, Haarman, Haszpra, Haugen, Kalocsay, Kelemen, Koutny, Leyk, Lomb, Máthé, Neumer K., Péter S., Phillipson, Princz, Prószéky, Rubinyi, Ruzsa, Vizi, Rados, Schubert, Szarka, Szenes, Szerdahelyi, Szilvási, Tarnóczy, Tófalvi, Tótfalusi, Varga-Haszonits, Waringhien, Wurm – kompreneble, kun titoloj de libroj kaj artikoloj.

La ĉapitro pri planlingvoj kaj lingvoprojektoj certe ne estas perfekta kaj ne estas "esperantisma", ĝi provas resumi kutimajn argumentojn por kaj kontraŭ planlingvoj; la ĉapitro enhavas ankaŭ erarojn, sed ĝi estas pli bona kaj pli detala ol similaj partoj en similaj libroj, kompendioj.“

5.5 Geheimsprachen (Fred B. Wrixon)

Antaŭ ne longe germane aperis jena verko:

Wrixon, Fred B. (2006): Geheimsprachen, Codes, Chiffren und Kryptosprachen. Von den Hieroglyphen zum Digitalzeitalter. (Traduko el la usonangla de Rudolf Brenner).

[Königswinter]: Könnemann/Tandem Verlag, 704 p. [originala titolo: Codes, Cyphers, and Secret Languages, New York: Black Dock & Leventhal, 1989].

Sur la paĝoj 577-586 troviĝas la ĉapitro „Internationale Kunstsprachen“ (internaciaj artefaritaj lingvoj), kiu montras la nur suprajn scion de la aŭtoro. La ĉapitro pri Esperanto (p. 583-586) enhavas erarojn..

Unu ĉefa ĉapitro listigas diversajn biografiojn, inter ili tiun de *Auguste Kerckhoffs* (1835-1903), kiu ne nur estis konata volapukisto sed ankaŭ okupiĝis pri sekretaj lingvoj por militaj celoj (p. 607-608).

5.6. Studoj de Ivo Bratanov el Bulgario

Dum la lastaj jaroj oni bedaŭrinde nur malofte ion ekscias pri interlingvistikaj aŭ esperantologiaj studoj aperintaj en bulgarlingvaj sciencaj revuoj aŭ antologioj.

Pro tio ni aparte ĝojis pri la studoj de la sciencisto kaj esperantisto *Ivo Bratanov* (Ruse, Bulgario). La aŭtoro afable disponigis la materialon:

Bratanov, Ivo (2003): Predavane na antroponimi v ĉesperantskija prevod na romana „Pod igoto“ na Ivan Vazov. In: Nauĉni trudove. Tom 40, serija 5. Majska nauĉni ĉetenija. Ruse: Rusenski universitet „Angel K’nev“ p. 9-12. (Antroponimoj en la Esperanto-traduko de la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov).

--(2003): Za ĉesperantskite prevodi na romana „Pod igoto“ na Ivan Vazov. In: Nauĉni trudove. Tom 40, serija 10.2. B’lgarski ĉzik, literatura i izkustvo. Ruse: Rusenski universitet „Angel K’nev“ p. 31-35. (Pri la Esperanto-traduko de la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov).

--(2004): Osobenosti na punktuacijata na p’rvija ĉesperantski prevod na romana „Pod igoto“ na Ivan Vazov Upotreba na zapetaja). In: Nauĉni trudove. Tom 41, serija 6.2. ĉzikoŝnanie i literaturoŝnanie. Istoriija, ĉtnologija i folklor..Ruse: Rusenski universitet „Angel K’nev“ p. 34-38. (La komo en la Esperanto-traduko de la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov).

--(2004): Upotrĉbata na prepinatelnite znaci b p’rbija ĉesperantski prevod na romana „Pod igoto“ na Ivan Vazov. In: Nauĉni trudove. Tom 41, serija 7.2. Majska nauĉni ĉetenija. Ruse: Rusenski universitet „Angel K’nev“ p. 25-30. (Interpunkcio en la Esperanto-traduko de la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov).

--(2005): Predavane na c’rkovnoslavjanskite citati v p’lnija ĉesperantski prevod na romana „Pod igoto“ na Ivan Vazov. In: Nauĉni trudove. Tom 44, serija 7.1. Majska nauĉni ĉetenija. Ruse: Rusenski universitet „Angel K’nev“ p. 9-18. (Traduko de eklezi-slavaj esprimoj en la Esperanto-traduko de la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov).

La esploroj koncernas jenan verkon:

Vazov, Ivan (1959): *Sub la jugo. Tradukis: Simeon Hesapĉiev, Simeon Simeonov, Stefan Kiragiev, Zora Mladenova-Hans, Georgi Dimov, Canko Murgin, Minko Conkovski, Asen Simeonov kaj Georgi Dolapĉiev. Redaktis Simeon Simeonov kaj Asen Simeonov. Sofia: Bulgara Esperantista Asocio, 461 p.,*

La adreso de la aŭtoro: Ivan Bratanov, BG 7020 Ruse, ul. Drama Nr. 13, bl. Jalta, vĉ. 1, et. 1, ap. 1. ibratanov@abv.bg.

5.7 Giuseppe Peano kaj Louis Couturat – la korespondaĵoj

Luciano, E./ Roero, C. S. (2005): *Giuseppe Peano – Louis Couturat. Carteggio (1896-1914). Firenze: Olschki; 250 p.*

La verko, el la plumo de du fakulinoj pri *Peano* el la Torina universitato, entenas ĉ. 110 leterojn, el kiuj 97 estas de *Couturat* al *Peano*, 4 estas malnetoj de respondoj de *Peano* al *Couturat* kaj la

ceteraj estas samepokaj leteroj pri la temo inter *Peano* kaj aliaj matematikistoj. Ĝi estas la kompleta literaro ĉerpita el la arkivo de *Peano* en Cuneo, lia naskiĝurbo, kie estas nun kolektitaj ĉiuj liaj paperoj. Tra tiuj leteroj, preskaŭ ĉiuj en la franca (sen traduko) kaj du en Ido kiam *Couturat* transiris al ĝi, montriĝas la forta intereso de *Couturat* pri la problemo de internacia komunikado en la scienco, liaj streĉoj por la organizado de sciencaj kongresoj kaj lia entuziasma klopodado por adopto de internacia planlingvo. *Peano* rolas nur fone, ja la leteroj de li al *Couturat* perdiĝis; krome li estas skeptika pri la ideo de internacia planlingvo por ĝenerala uzo. Li opiniis, ke estas malfacile eĉ nur konstrui lingvon akcepteblan kaj facile uzeblan de kleraj personoj. La du sciencistoj dividiĝas, kiam la „Delegitaro por la adopto de Internacia Lingvo“, forte proponita de *Couturat* kaj al kiu li klopodas doni scienca aŭtoritatecon, finas sian laboron konsilante tiun reformitan Esperanton, kiu alprenos la nomon Ido. *Couturat* iĝos fervora idisto, *Peano* plu daŭrigos per la uzado de sia Latino sine flexione. La verko profitas je ege ampleksa kaj vere laŭdinda komentario kun klarigoj kaj kompletigoj. Bedaŭrinde enŝteliĝis kelkaj misoj, kiam temas pri personoj de la Esperanto-mondo; pri Beaufront estas skribite, ke mankas informoj, pri Nylen same, pri Adolf Schmidt same: konanto de la esperantista medio estus facile povinta pleniĝi tiun informomankon.

Carlo Minnaja

5.8 Romano kun Esperanto kaj Zamenhof

Foje Esperanto kaj Zamenhof ludas certan rolon en romano, jen germana ekzemplo:

Leupold, Dagmar (2007): Grüner Engel, blaues Land. München: C.H. Beck oHG, 204 p.

I.a. temas pri historiisto, kiu verkas biografion pri Zamenhof. Li invitas sian amikinson Sophia al Belgio, kie proksime de Liège ekzistis la ŝtato-simila neŭtrala teritorio Moresnet.

Fonto kun germanlingva recenzo:

(http://www.regional-themenguide.de/service/sms/hannover-stadt-und-region/tipps__infos/veranstaltungen/lesungen__vortraege/dagmar_leupold_gruener_engel_blaues_1and.html , 16.6.2007).

6 Noam Chomsky pri Esperanto kaj plurlingvismo

Dum marto 2003 la lingvisto *Mark Aronoff* de la Stony Brook University (Department of Linguistics), Stony Brook/USA, intervjuis la lingviston *Noam Chomsky*.

La intervjuo „Chomsky On Linguistics“ estas konservata kiel pdf-dosiero [www.celt.sunysb.edu/celtweb/images/Chomsky%20and%20Aronoff%20\(Toledo%20Transcript\).pdf](http://www.celt.sunysb.edu/celtweb/images/Chomsky%20and%20Aronoff%20(Toledo%20Transcript).pdf)

Ni prezentas tiun parton, kie Chomsky sin esprimas pri Esperanto, plurlingvismo kaj la lingva situacio en Usono. En la antaŭiranta alineo Chomsky komentas la sekvojn de la malapero de lingvoj. Post tio sekvas jena diskuto (MA *Mark Aronoff*, NC *Noam Chomsky*):

„*MA*: *Would it be harder to do linguistics with fewer languages?*

NC: Sure. You're losing evidence all the time. I mean, if we only had English, let's say, we wouldn't have a clue about the principles of English because you learn about them when you study other languages.

When, say, Jim Wan (1856) did the first serious modern studies of Chinese that immediately led to discoveries about English. You didn't learn new phenomena of English, but you suddenly realized these are strange phenomena and they have to be explained, and that led on to other things. And the same is true of any range of languages you look at. I mean, just as if you didn't have a lot of chemical elements, you might be highly misled about the nature of elements.

MA: This is really a reverse question here. A Century ago, there was great interest in universal languages like Esperanto.

In fact, many of the founding members of the linguistic society of America were interested in questions of universal language, and some of the earliest financial support for linguistics came from people and organizations that were interested in universal languages.

A large impetus for that was the feeling that people had difficulty understanding one another across cultures. There's much less interest in international languages today, in part because people say English is now the universal language. Is that a good development, this ascendance of English?

NC: Well, there are separate issues here.

The interest of linguists, as linguists, in universal language was based on an illusion, which linguists had but no longer have. That was the illusion that Esperanto is a language, and it isn't. Yeah, Esperanto has a couple of hints that people who know language can use based on their own linguistic knowledge to make a language out of it, but nobody can tell you what the rules of Esperanto are. If they could tell you that, they could tell you what the rules of Spanish are, and that turns out to be an extremely hard problem, a hard problem of the sciences, to find out what's really in the head of a Spanish speaker that enables them to speak and understand and think the way they do. That's a problem at the edge of science.

I mean, a Spanish Speaker knows it intuitively, but that doesn't help. I mean, a desert ant knows how to navigate, but that doesn't help the insect scientist. You got to figure out what the ant is doing, and it's now understood that that's an extremely hard problem. You go back a generation or two, it was considered a trivial problem because of lack of understanding of the nature of language.

To take a kind of analogue, if you go back to pre-Galilean times, there's no problem about why if I let this go, it's going to fall to the ground. It's going to its natural place. What else is there to say? Well, it turned out that there was a lot to say. To be puzzled by simple questions is a very hard step, and it's the first step in science, really. And the same is true about the nature of Esperanto, or Spanish, on which it's based, and so on. We don't know the answers to the questions of what the principles of Esperanto do because if we did, we would know the answer to how language works, and that's much harder than knowing how a desert ant navigates, which is hard enough. So, now it is understood that Esperanto is not a language. It's just parasitic on other languages.

Then comes a question, which is not a linguistic question, but a question of practical utility. Is it more efficient to teach people a system which is parasitic on actual languages, and somewhat simplifies, eliminating some of the details of actual historical languages; or is just more efficient to have then a whole lot of languages. And I think it's now pretty widely accepted that the latter is better and not hard. I mean, it's a little misleading in the United States. The United States is unusually monolingual as compared with, say, Europe a generation or two ago, and the reason is not linguistic. It's that the people who conquered the United States has actually exterminated everybody, and if you exterminate the native population, yeah, then it ends up monolingual. But Southern California alone probably had hundreds, thousands of languages, and they're all gone, mostly gone. So, just in the United States, people tend to know one... well, actually, it's misleading. The languages that are spoken, which we call English, are sometimes mutually incomprehensible.

I remember giving talks in eastern Kentucky where I could understand the students in the Colleges because they were taught standard English as a second language, like students in Italy were taught Italian as a second language, but when I walked through the streets, I could barely understand what people were saying. Or, where I happened to grow up in Philadelphia, which is urban Philadelphia, I would sometimes take the trolley car somewhere, and there would be a kid sitting behind me in the next row, and I couldn't understand a word they were saying. I mean, they were talking what is now called Black English, which is just another language similar to my English, but not the same. So, there is a variety of languages in the United States, but much less than in areas of comparable scope, largely because of the nature of the conquest of the continent.

But in many parts of the world, it's completely normal for a child to grow up speaking a number of languages. I mean, West Africa, say, maybe the mother speaks one language and the father speaks a different language and your aunt speaks another language and the kid just grows up knowing all of them.

So, it is perfectly possible for children to grow up without effort knowing plenty of languages, and even not living in that cultural milieu, it can be done. And the question is whether that's a more efficient mode of organizing the world and teaching an extra language, which is modeled on the existing ones but somewhat leveled so that it comes easier for, say, romance Speakers.“

Eble al *Chomsky* mankis la tempo vere informiĝi pri Esperanto...

7 Interlingvistiko en universitatoj

7.1 “Esplorunuoj interlingvistiko“ en Poznań

Sekvante proponon de *prof. d-rino Alicja Sakaguchi*, dum Konsilantarkunsido de la Novfilologia Fakultato de Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań estis akceptita la propono krei esplorunuojn „interlingvistiko“. Ĝi funkcias ekde la 24-a de majo 2007 kadre de la Instituto pri Aplikata Lingvistiko. La pola nomo estas: Pracownia Interlingwistyki. En la interretpaĝoj de la universitato oni informos pri la celoj kaj la profilo de la – momente eta – esplorunuoj. Al la germana, angla kaj rusa nun aldoniĝas en la Instituto kiel konstanta esplor- kaj instruobjekto ankaŭ Esperanto.

(Laŭ *Alicja Sakaguchi*)

7.2 Disertacio Tolomeo

Jam antaŭ kelkaj jaroj estis defendita jena disertacio:

Tolomeo, Maria (2001-2002): Processi di iperregolarizzazione nei bambini che apprendono una lingua iperregolare. Roma: Università degli studi di Roma „La Sapienza“ (Facoltà di Psicologia.), 188 S.

La laboraĵo, kiun subtenis ankaŭ *Renato Corsetti*, esploras fenomenojn de la „superregulado“ ĉe la lingvo-uzo de infanoj, kiuj lernis „superreguligitan“ lingvon, ĉi-kaze Esperanto.

7.3 Interlingvistika prelego en la universitato de Kazan

De la 5-a ĝis 7-a de majo en la Kazana universitato okazis internacia konferenco kadre de kiu *Aleksandr Mel'nikov* prelegis pri "Komparo de la naturaj kaj artefaritaj lingvoj: ĉu trafaj kriterioj de la klasifado?" La esenco estas, ke oni devus kompari/distingi koncernajn lingvojn laŭ la jenaj kvar kriterioj: 1) strukturo, 2) funkcioj, 3) oboe al la ĝeneralaj lingvaj leĝoj (inkluzive la eblecon arbitre ŝanĝi erojn de lingvo kaj la vojojn de la evoluo), 4) maniero de apero ("revolucia/aŭtora" - "evolucia/ popola"). Esperanto kaj la vere artefaritaj lingvoj (projektoj) similas inter si nur laŭ la 4 a kriterio, dum laŭ la unuaj tri Esperanto similas al ajna etna lingvo kaj diferencas de ajna vere artefarita lingvo. Sekve, Esperanto devas esti konsiderata natura lingvo. Koncerna artikolo aperis en la materialoj.

Similan prelegon *d-ro Aleksandr Mel'nikov* jam faris 27.4.07 en la Ŝtata Pedagogia Universitato en Jekaterinburg kaj 28.4.07 en la Ŝtata Universitato en Tjumen. (Laŭ informoj de *A. Mel'nikov*)

7.4 Interlingvistika seminario en la Universitato Varese/Italien

Federico Gobbo

Ĉe Insubra Universitato, Varese, en Junio 2006, okazis la dua eldono de la seminario "Lingua Artificio" (Lingvo kaj Artefariteco), kadre de la kurso pri ĝenerala lingvistiko, oficiale agnoskita de la Insubra Universitato per publika anonco kaj financa subteno. La didaktikan seminarion, valida por la studentoj de Sciencoj de la Komunikado, daŭras unu krediton (8 horoj). Ĝin gvidas *Federico Gobbo*, doktora studento pri informadiko ĉe Insubra Universitato kaj membro de la redaktora teamo de „Language Problems & Language Planning (LPLP) pri librorcenzado. Lia esplorado en

interlingvistika kaj esperantologia fakoj komenciĝis ekde la magistra tezo, diskutita ĉe Torina Universitato kun prof-ro *Fabrizio A. Pennacchiotti* en 1998, kaj neniam ĉesis.

La seminario intencas konsciigi la studentojn pri la artefaritaj aspektoj de la homaj lingvoj, sendepende ĉu planlingvoj aŭ ne, prezentante la aliron al la problemoj fare de kelkaj klasikaj aŭtoroj, kiel *Einar Haugen*, *Heinz Kloss* aŭ *Joshua Fishman*.

Ekzemple, oni priparolas la rilaton inter lingvo kaj identeco, la diferencon inter nacio-ŝtatoj kaj ŝtato-nacioj, kaj uzas la ilaron de konceptoj komunaj en lingvoplanado, inter aliaj diglosio, [kun [sekvas germanaj terminoj laŭ Kloss-DB] Sprachnähe (lingvoproksimo), Abstand- kaj Ausbausprache, respektive distanco- kaj ellaboradolingvo, Einbausprache, t.e. unuigita lingvo, aŭ la fishmana GIDS (Graded Intergenerational Disruption Scale).

La studentoj lernas, ke ĉiu homa lingvo estas socia konstruaĵo. Pro tio oni donas kelkajn ekzemplojn el la nacia nivelo, svisa kaj itala (notu, ke Varese estas itala urbo tre proksima al la svisa landlimo). Speciale oni pridiskutas la normigon de la itala lingvo rilate al la (parolata) latina kaj la kritikitan romanĉan tegmentolingvon fare de *Heinrich Schmidt*, nome Rumantsch Grischun.

Sed la minoritataj lingvoj ne forgesatas: por komparo, oni parolas pri la sarda, grava italia lingvo, malmulte normigita, en Limba Sarda Comuna, kiu tre viglas, kaj la cimbra, la plej malgranda minoritata lingvo en Italio, kiu estas ĝermana lingvo en danĝera stato.

Fine, oni priskribas la paradokson malantaŭ la lingvopolitiko de EU kaj la koncepton de "global English". La ekzisto kaj problemigo de la koncepto "lingvo" malfermas la pordojn al la superrigardo pri interlingvistiko. La apliko de lingvoplanadaj konceptoj al planlingvoj estas sufiĉe nova kaj originala kaj ricevis bonan eĥon de la aŭdantaro.

Apartan atenton oni donas al la du ĉefaj fazoj de la planlingva vivo: lingvofarado, t.e. kiam lingvoprojekto estas tuŝebla, antaŭ publikigo, kaj "semiologia vivo" (*F. de Saussure*), t.e. kiam la lingvo ekformis parolkomunumon, kaj konsekvence nur lingvoplanadaj agadoj eblas.

Estas diversaj kunteksto el kiuj fontas la plej interesaj planlingvoj, kaj tiu fakto estas spegulita en la lingvoj mem. Pli precize prezentitas: Volapuko, Esperanto, Latino sine flexione, Ido, Occidental (nun nomata Interlingue), Novial, Basic English kaj Interlingua..

Por didaktikaj celoj, la historio de la interlingvoj kaj tiu de la esperanto-movado estas kunigitaj dum la lekcioj. Aparta atento donatas al la interreta renesanco, t.e. la helpo (re)organizi la movadojn por iu planlingvo, ekz. per la diverslingvaj Vikipedioj. En la kazo de Esperanto, la falo de la Berlina muro havis gravan rolon en la movada evoluo. Finas la seminarion la esperantologia parto, kie oni traktas kelkajn aspektojn de la lingva strukturo kaj kelkajn literature konatajn aspektojn de la evoluo de la socilingvistika fenomeno Esperanto, speciale la tiel nomata denaskismo. La seminario vekis la atenton de la GSPL (itala akronimo por Grupo pri Studo pri la Politiko Lingvaj), speciala fakgrupo de la Societa' di Linguistica Italiana (SLI), kiu mencias la seminarion inter la prilingvistikaj kursoj universitatnivelaĵoj nuntempe aktivaj en Italio.

Esenca literaturo uzita dum la seminario:

- Astori, Davide (2006). La poesia esperantista. Poesia, N. 205-6, Anno XIX, Maggio-Giugno. –
- Blanke, Detlev (2004). Esperanto kaj Socialismo? Pri la movado sur la "alia flanko". Novjorko: Mondial.
- Dell'Aquila, Vittorio e Ianna'caro, Gabriele (2004). La pianificazione linguistica. Lingue, società e istituzioni. Milano: Carocci.
- Gazzola, Michele (2006). Managing Multilingualism in the European Union: Language Policy Evaluation for the European Parliament. Language Policy. 5:393-417. doi:10.1007/s10993-006-9032-5
- Gobbo, Federico (2006). Planning languages and language planning — The contribution of Interlinguistics to cross-cultural communication, in: Proceedings of Multilingualism & Applied

Comparative Linguistics MACL, Vrije Universiteit Brussel, Brussels, Belgium, 8-10 February 2006. Newcastle upon Tyne: Cambridge Scholar Press. to appear.

- Gobbo, Federico (2005), The digital way to spread conlangs. in: Santiago Posteguillo et al. (eds), LANGUAGE @t work: language learning, discourse and translation studies in Internet. 2nd International Conference on Internet and Language ICIL2005. 27-28 October. (vol. 1, pp. 45-53). Castellon, Spain: Publicaciones de la Universitat Jaume I.

(*Federico Gobbo*. Doctoral Candidate. DICOM -- Dipartimento di Informatica e Comunicazione> Universita' degli Studi dell'Insubria v. Mazzini 5, IT-21100 Varese Italia tel. ++39/0332/218927 fax ++39/0332/218919.

<http://www.dicom.uninsubria.it/~federico.gobbo/>)

7.5 Slavistika konferenco en Humboldt-Universitato (Berlin) kun Esperanto

De 31-a de majo ĝis 2-a de junio 2007 la Slavistika Instituto de Humboldt-Universitato en Berlin okazigis internacian konferencon pri la kadra temo „La eŭropeco de slavaj lingvoj kaj kulturoj aŭ la slaveco de Eŭropo: Kontribuo al kultura kaj lingva relativeca lingvistiko“.

La konferencon ankaŭ partoprenis *prof. d-ro Jouko Lindstedt*. Je lia propra surprizo la organizantoj invitis lin paroli pri temo lige al Esperanto.

Li elektis la temon „Esperanto – ĉu orienteŭropa kontaktlingvo“ ? ‚Kontaktlingvo’ estu komprenata en kontaktlingvistika senco. La prelego trovis bonan eĥon. (Laŭ informo de *Jouko Lindstedt*)

8 Pri interlingvistiko en la reto

8.1. Polimetrica: Anglaj superrigardoj pri la objekto de interlingvistiko

Laŭ iniciato de la itala eldonejo Polimetrica kelkaj interlingvistoj prezentis sian opinion pri la objekto de interlingvistiko, en la reto:

Sub *Category Archives: Interlinguistics*. www.polimetrica.eu/site/?cat=6 oni tie trovas (laŭ alvendo de la kontribuoj):

8.1.1 Interlinguistics (LIU Haitao) 26-Apr-07

LIU Haitao

Communication University of China, Beijing

In 1911, the Belgian Jules Meysmans introduced the term interlinguistique in his article “Une science nouvelle”. According to Meysmans, interlinguistics aims at studying “les lois naturelles de la formation des langues auxiliaires communes”(Meysmans 1911-12: 14). By the new science, Meysmans hopes to find the laws of formation of artificial or natural [...]

Filed in [Interlinguistics](#) | [Comments \(0\)](#) »

8.1.2 Interlinguistics (Detlev Blanke) 17-Apr-07

Detlev Blanke

German Society for Interlinguistics (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.), Germany

1 Introduction

The term ‘interlinguistics’ first appeared in its French variant as ‘interlinguistique’ in 1911 in a journal edited by Jules Meysmans (Meysmans 1911/12). The notion is closely related to international planned languages (also called international auxiliary languages, international artificial languages, universal languages). These are languages consciously [...]

Filed in [Interlinguistics](#) | [Comments \(0\)](#) »

8.1.3 Interlinguistics (Richard Kennaway) 30-Mar-07

Richard Kennaway, School of Computing Sciences, University of East Anglia, Norwich, U.K.

Interlinguistics is the study of auxiliary languages that enable people from different linguistic communities to communicate with each other.

The term has been used in various narrower or wider senses. It is usually restricted to the study of international auxiliary languages, artificially constructed for the purpose. The most [...]

Filed in [Interlinguistics](#) | [Comments \(0\)](#) »

8.1.4 Interlinguistics (Frank Nuessel) 31-Jan-07

Frank Nuessel, University of Louisville, USA

Interlinguistics is the branch of linguistics that studies planned or constructed languages. The earliest usage of the adjective 'interlinguistic' is attributed to George Meredith in 1879.

Subsequently, the journal *The International Language: A Journal of Interlinguistics* published from 1911 to 1915 in London uses the nominal form. The Danish linguist, Otto [...]

Filed in [Interlinguistics](#) | [Comments \(0\)](#) »

8.1.5 Interlinguistics (Frank Esterhill) 23-Jan-07

Frank Esterhill, Interlingua Institute, USA

In the opinion of the Danish linguist, Otto Jespersen, interlinguistics was to be that new branch of language science which would elucidate the principles upon which satisfactory and competent interlanguages could be formulated. At the end of the nineteenth and start of the twentieth century, the world had witnessed the apparition [...]

8.2 Reta esperantologia revuo: „Lingva Kritiko“

Bertil Wennergren (<http://bertilow.com>) antaŭ nelonge fondis esperantologian retrevuon kun la nomo "Lingva Kritiko (Studoj kaj notoj pri la Internacia Lingvo) Esperantologio Interreta": <http://lingvakritiko.com>.

[Al la unuopaj kontribuoj sekvas diskuto. Jenaj studoj aperis \(ĝis 20.6.2007\):](#)

1 "Pri Lingva Kritiko" (Bertilo Wennergren)

<http://lingvakritiko.com/2006/11/28/pri-lingva-kritiko/> (9.12.06)

2 "Vortbazita teorio : ĉu struktura aŭ transformata?" (Ken Miner)

<http://lingvakritiko.com/2006/12/08/vortbazita-teorio-chu-struktura-au-transformata/> (9.12.06)

3 "Malklaraĵoj en la Fundamento" (Bertilo Wennergren)

<http://lingvakritiko.com/2006/12/03/malklarajhoj-en-la-fundamento/> (9.12.06)

4 "Esperanto tra bruo" (Bertilo Wennergren)

<http://lingvakritiko.com/2006/11/30/esperanto-tra-bruo/> (9.12.06)

5 "Tabelvortoj en PIV" (Bertilo Wennergren)

<http://lingvakritiko.com/2006/11/29/tabelvortoj-en-piv/> (9.12.06)

6 "Neeblaj sonsinsekvoj en la Esperanta poezio" (Ken Miner)

<http://lingvakritiko.com/2006/11/28/neeblaj-sonsinsekvoj-en-la-esperanta-poezio/> (17.12.06)

- 7 "La gramatikaj terminoj en PMEG" (Bertilo Wennergren)
<http://lingvakritiko.com/2006/11/28/la-gramatikaj-terminoj-en-pmeg/> (17.12.06)
- 8 "Kien meti'-um' en la morfologio?" (Ken Miner)
<http://lingvakritiko.com/2006/12/17/kien-meti-um-en-la-morfologio> (17.12.06)
- 9 "Malklaraĵoj pri la oficialigitaj elementoj" (Bertilo Wennergren)
<http://lingvakritiko.com/2006/12/19/malklarajhoj-pri-oficialigitaj-elementoj/> (12.12.06)
- 10 "Silabo kaj silabado" (Marc Bavant)
<http://lingvakritiko.com/2006/12/20/silabo-kaj-silabado/> (26.12.06)
- 11 „Mallonga komparo inter ‚alies‘ kaj ‚aliula‘ (Ken Miner)
<http://lingvakritiko.com/2006/12/31/mallonga-komparo-inter-alies-kaj-aliula/> (3.1.2007)
- 12 „Poezio kiel fonto de la mankantaj o-formoj“ (Ken Miner)
<http://lingvakritiko.com/2007/01/13/poezio-kiel-fonto-de-la-mankantaj-o-formoj/> (24.1.07)
- 13 „Pri kelkaj uzoj de *po* en la Biblio“ (Marc Bavant)
<http://lingvakritiko.com/2007/01/20/pri-kelkaj-uzoj-de-po-en-la-biblio/> (24.1.07)
- 14 „La Esperanta imperfektiva aspekto: verba ‚-ad‘“ (Ken Miner)
<http://lingvakritiko.com/2007/01/27/la-esperanta-imperfektiva-aspekto-verba-ad/> (31.1.07)
- 15 „La artikolo“ (Sergio Pokrovskij)
<http://lingvakritiko.com/2007/02/05/la-artikolo/> (8.2.07)
- 16 La taĝika ĉefurbo (Sergio Pokrovskij)
<http://lingvakritiko.com/2007/02/05/la-taĝika-ĉefurbo/> (8.2.07)
- 17 Internaciaj adjektivoj en ‚-al- kiel fonto por Esperantaj terminoj (Cyril Brosch, 16.3.07)
<http://lingvakritiko.com/2007/02/25/internaciaj-adjektivoj-en-al-kiel-fonto-por-esperantaj-terminoj/>
- 18 Kial do oficialigi? (Bertilo Wennergren)
<http://lingvakritiko.com/2007/03/10/kial-do-oficialigi/> (16.3.07)

8.3 Informoj de la Akademio des Esperanto en la reto

La Akademio de Esperanto (<http://www.akademio-de-esperanto.org/>): publikigas serion da informoj en la reto. Ĝis nun (20.6.07) aperis:

Oficialaj Informoj numero 1 - 2006 09 15: "Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio" - teksto proponata de la Sekcio pri Prononco).

Oficialaj Informoj numero 2 - 2006 09 26: "REVIZIO DE DU KURSOJ EL LA RETEJO lernu.net".

Oficialaj Informoj numero 3 - 2006 10 07: "Pri la Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro"

Oficialaj Informoj numero 4 - 2006 10 20: "Raporto pri la publika kunsido de la Akademio dum la Universala Kongreso en Florenco - 2006-08-01".

Oficialaj Informoj numero 5 - 2006 10 27: "Raporto pri la stud-tago memore al Bruno Migliorini"

Oficialaj Informoj numero 6 - 2007 01 21: "Pri apartaj teknikaj bezonoj rilate al niaj alfabeto kaj ortografio".

Oficialaj Informoj numero 7 - 2007 03 06: "Aprobo de la Naŭa Oficiala Aldono".

Oficialaj Informoj numero 8 - 2007 03 10: "Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro"

Oficialaj Informoj numero 9 - 2007 05 03: "La Akademio de Esperanto ĵus reorganizis la Sekcion Konsultejo".

8.4 George Dalgarno

Jam antaŭ kelka tempo la lingvistoj *David Cram* und *Jaap Maat* publikigis kelkajn materialojn pri filozofiaj lingvoj en la 17-a jarcento kaj aparte traktis la projekton „Ars signorum“ (1661) de la skoto *George Dalgarno* (1626-1687):

Maat, Jaap (1999): Philosophical Languages in the Seventeenth Century: Dalgarno, Wilkins, Leibniz (Amsterdam: Institute for Logic, Language and Computation).

Maat, Jaap/Cram, David (2000): Universal Language Schemes in the 17th Century. In: Auroux, Koerner, Niederehe, Versteegh (red.): History of the Language Sciences, Vol. 1 (Berlin, New York: Walter de Gruyter: p. 1030-1043.

Cram, David/Maat, Jaap (2001, eds): George Dalgarno on Universal Language: The Art of Signs (1661), The Deaf and Dumb Man's Tutor (1680), and the Unpublished Papers. Oxford: Oxford University Press.

La aŭtoroj intertempe kreis retejon pri la projekto de Dalgarno klopodante evoluigi ĝin:
http://www.ling-phil.ox.ac.uk/tulip/index.php?page_id=141

8.5 Terminologiaj materialoj de Bernhard Pabst kaj Rüdiger Eichholz

Ni informas pri kelkaj materialoj pri terminologio, kiujn ellaboris Bernhard Pabst kaj Rüdiger Eichholz (1922-2000).

La substrekitaj dosieroj troviĝas en la retejo de Bernhard Pabst:

<http://www.familienforschung-pabst.de/EspBiographien/PPLeitS.htm>

8.5.1 La bulteno Terminoteko (1991-1996) de Bernhard Pabst

[Terminoteko 01](#) , [Terminoteko 02](#) , [Terminoteko 03](#) , [Terminoteko 04](#) , [Terminoteko 05](#) ,
[Terminoteko 06](#) , [Terminoteko 07](#) , [Terminoteko 08](#) , [Terminoteko 09](#) , [Terminoteko 10](#) ,
[Terminoteko 11](#) , [Terminoteko 12](#) , [Terminoteko 13](#) , [Terminoteko 14](#)

8.5.2 Materialoj de Rüdiger Eichholz

[Dekunu Paroladetoj pri Pekoteko](#)

[Kritikoj kaj komentoj](#) (lige al la prilaborado de Plena Ilustrita Vortaro - PIV (1995)

[Enkondukoj al la dua volumo](#) de Plena Pekoteko de Rüdiger Eichholz (†), Edward Spitaels (†) kaj Bernhard Pabst

Registro: [Esperanto](#), [Deutsch](#), [English](#), [Français](#)

Nociaj kompleksoj en Pekoteko: [ĉefa dosiero](#) kun proksimume 3700 nociaj kompleksoj.
Provizora [shaka terminaro](#) (1993)

9 Revuoj

9.1 „Rivista Italiana di Esperanto“ – forgesita esperantologia revuo

Reinhard Haupenthal

Unu el la problemoj de la esperantologio kaj interlingvistiko troviĝas en tio, ke fontoj forgesiĝas kaj perdiĝas kaj sekve ankaŭ la materialoj tie deponitaj. Tio validas i.a. por esperantologia revuo itallingva: *Rivista Italiana di Esperanto* (Milano 1. 1962/63: 1-2). Aperis nur du fascikloj kun po 48 paĝoj. La redaktan teamon konsistigis: *Clelia Conterno Guglielminetti* (1915-1984), *Vittorio Dall'Acqua* (1934-1979), *Pierluigi Marelli* (1929-1986), *Giuliano Turone* (* 1940).

Ĉi-sekve ni listigas (alfabete kun indiko de la DK- resp. BDK-kodo⁴) la kontribuojn tie aperintajn. Ĉe la recenzoj ni limiĝas al la pli gravaj.

9.1.1 Artikoloj

[anonima]: Bibliografia dell'Esperanto. 1, 26-32. [1.] Testi d'insegnamento, p. 27-31, [2.] Chiavi di Esperanto, p. 32., 016 : E 825

[anonima]: Gli elementi chimici (La kemiaj elementoj). 2, 30. 54

[anonima]: La Divina Commedia in Esperanto. 2, 37-39. 850 DAN : E

CLISSOLD, Peter: Marista terminaro. Versione Italiana di Pierluigi Marelli. 1, 36-38; 2, 31-36. 656.6 (03) = 5

CONTERNO GUGLIELMINETTI, Clelia: La piu' giovane letteratura del mondo. 1, 5-7. 812

– : La metrica dell' Esperanto. 2, 18-23. E 62

DALL'ACQUA, Vittorio: La stampa esperantista. 1, 17-19. E 05

–: Influenza del russo sull' Esperanto. 2, 10-17. E 211.82

MARELLI, Pierluigi: L' alfabeto della lingua internazionale. 1, 8-16. E 11

–; TURONE, Giuliano: Breve storia delle applicazioni commerciali dell' Esperanto. 1, 20-25. E : 38

–: La situazione linguistica dell' Africa. 2, 24-29. 4 (6)

NEERGAARD, Paul: Fitopatologia terminaro. Versione Italiana di Gustavo Perini. 1, 34-35. 581.2 (03) = 5

TURONE, Giuliano: Cartesio precursore dell' Esperanto. 2, 1-9. 411.2 DES

9.1.2 Recenzoj

La nomoj de la recenzantoj troviĝas en krampoj:

PEI, Mario: One language for the world. New York 1961. (Giuliano Turone) 1, 39-41; (Pierluigi Marelli) 1, 42-43.

⁴ DK – Decimala klasifiko. BDK- klasifiko laŭ la angla esperantologo kaj bibliotekisto *Montagu C. Butler* en sia verko „Klasifo de Esperantaj Temoj“ Bergen-op-Zoom: Esperanto-Film-Grupo, 144 p., 1950).

NEERGAARD, Paul: Atako kontraŭ ĝarden-plantoj. Rickmansworth 1954. (Gustavo Perini) 1, 43.

K. OSSAKA: 505 elektitaj poemoj el Mannjoo-Shuu. Tokio 1958. – M. PAGNOL: Topaze; C. VILDRAC: La ŝipego „Tenacity“. Trad. R. Bernard. La Laguna 1960. (Clelia Conterno Guglielminetti) 1, 44-45.

R. W. JUMPELT: Die Übersetzung naturwissenschaftlicher und technischer Literatur. Berlin 1961. (Pierluigi Marelli) 2, 40-42.

C. M. BEAU: Matematika terminaro. Heronsgate 1954. (Pierluigi Marelli) 2, 43.

9.2 Interlingvistiko en „La Ondo de Esperanto“

En la revuo „La Ondo de Esperanto“ fojfoje aperas interlingvistikaj kontribuoj. Tio i.a. okazis en 2006 kaj 2007. Bedaŭrinde ne ĉiuj artikoloj aperis en la reto. (* = la kontribuoj troviĝas en la reto, 20.6.07):

Kajero 4-5/2006:

(<http://esperanto.org/Ondo/Ondo/138-lode.htm#138-02>)

- Detlev Blanke: Interlingvistiko kaj esperantologio, ĉu vere necesaj?*
- Sergej Kuznecov: La principoj de la teoria priskribo de planlingvo
- Geraldo Mattos: Participo: gravega problemo
- Mónika Molnár: Esperanto el vidpunkto de occidentalisto

Kajero 6/2007:

(<http://esperanto.org/Ondo/Ondo/152-lode.htm#152-03#152-03>)

- Andreas Künzli: La plej granda enciklopedio en Esperanto (Intervjuo)*
- Aleksandr Duliĉenko: Paroli la komunan lingvon, por esti komprenata de ĉiuj.
- Detlev Blanke: Ni konservu la sciojn!*
- Michel Duc Goninaz: Kiel la anĝela *po* povas helpi vin por ricevi dolarojn, manĝi pomojn kaj eble ĉesigi la fumadon
- Bertilo Wennergren: Kial fari Oficialajn Aldonojn?*
- Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

10 KOD – ĉu ideala interlingvo?

Rudolf Fischer

En Germanujo ekde sep jaroj la esplorinstituto „eufo“ de tempo al tempo aperas en la gazetaro per nova linterlingvo KOD, kiu laŭdire estas perfekta: Same lingve alirebla por ĉiu ajn homo, pli facila ol Esperanto, trovonte grandan akceptemon en la publiko. Financas la projekton, por kiu laboras ĉirkaŭ dek lingvistoj, konata entreprenisto en Regensburg, kiu celas realigi unu el siaj dumvivaj revoj per KOD.

Analizante la sistemon laŭ la unua broŝuro, kiu aperis en 2006, oni konstatas tamen, ke grandparte la asertoj kompreneble estas malĝustaj: La lingvista kunlaborantaro intertempe konstatis la neceson de „kompromisoj“, kiuj tiom limigas la „perfektecon“, ke oni ne plu vidas avantaĝojn de KOD kompare kun ekz. Esperanto. Tute inverse.

La kerna ideo de KOD estas, ke ĉiu produktanto de teksto en KOD uzas morfologion „kiel en sia gepatra lingvo“, per afiksoj, kiuj havas gramatikajn signifojn. Notu bone: ĉiu do uzas alian morfologion ol malsamlingvano; la problemo estas do kompreni tekston, en kiu svarmas (laŭforme

arbitraj!) afiksoj por normalkaze tute fremdaj gramatikaj kategorioj. Kaj en KOD oni konas pli ol 300 gramatikajn afiksojn (dum Esperanto havas pli-malpli 15)!

Plia profunda eraro de la koncepto estas, ke ankaŭ la ordinara lingvoproduktanto tute ne „sentas sin lingve hejme, esprimante sin en KOD“ (el tio rezultu la pli granda akceptemo kaj la asertita tutmonda lingva alirebleco), ĉar kiu konas bone la morfologian sistemon de sia gepatra lingvo? Oni parolas kutime, sen konscii pri ĝi.

Ekzistas pliaj profundaj obstakloj, pri kiuj mi silentas tie ĉi. Al mia kritiko la KOD-grupo respondis nun surprize, ke KOD ne estas interlingvo, nur enkodiga sistemo de skribitaj tekstoj en ĉiuj (?) lingvoj de la mondo. Tio kontraŭdiras la celitan formon de KOD: la formon de la arbitraj radikoj kaj afiksoj destinis bona elparolebleco, kelkaj aliaj radikoj cetere havu Anglan prononcon!

La projekto entute estas giganta foruzo de mono, neglektante la interlingvikan literaturon, sed, kiel gazeto menciis ironie, la utilo de ĝi estas, nutri dek lingvistojn.

< <http://www.eufo-institut.de/>>

11 Personoj

11.1 Habilitiĝo de Klaus Schubert

La 18-an de aprilo 2007 *d-ro Klaus Schubert*, profesoro ĉe la Faka Altlernejo en Flensburg, habilitiĝis en la fako Aplikata Lingvistiko, en la Filologia Fakultato de la Teknika Universitato de Chemnitz.

Jen la aperonta habilitiĝa disertacio:

Schubert, Klaus (2007): Wissen, Sprache, Medium, Arbeit. Ein integratives Modell der ein- und mehrsprachigen Fachkommunikation. (Forum für Fachsprachen-Forschung 76.) Tübingen: Narr, X + 431 p., 88,00 Euro

Resumo de la disertacio

La germanlingva habilitiĝa disertacio kun la titolo „Scio, lingvo, medio, laboro: integra modelo de la unulingva kaj la plurlingva faka komunikado“ estas aplika sistema scienca priskribo de parola kaj skriba, unulingva kaj plurlingva profesia faka komunikado. Ĝi speciale atentigas teknikajn aŭtoradon, fakan tradukadon, fakan interpretadon kaj la organizon de dokumentaroj. La disertacio amplekse superrigardas la evolufluojn de la faklingvistiko kaj la tradukologio. Ĝi aparte emfazas la influon de la interlingvistiko, kiu injektas en la faklingvistikon la ideon de optimumigo, kiu en tiu disciplino hodiaŭ estas gvida ideo de centra graveco. La libro diskutas ĉu la integro de la faklingvistiko kaj la tradukologio rezultas en memstara scienco de faka komunikado. La koro de la studo estas nova integra komunikomodelo pri faka komunikado, kiu en sistema maniero priskribas la dimensiojn de fakkomunika agado vidalvide de la individuaj kaj kolektivaj kompetentecoj de la agantaj fakuloj.

Profesia kariero de Klaus Schubert

De 1976 ĝis 1982 Klaus Schubert studis Ĝeneralan Lingvistikon, Skandinavan Filologion kaj Slavan Filologion en la Universitatoj de Kiel (Germanio) kaj Uppsala (Svedio).

En 1982 li doktoriĝis pri temo el la kontrasta germana-sveda gramatiko ĉe la Universitato de Kiel (Germanio).

De 1983 ĝis 1985 li kunlaboris en socilingvistika esplora projekto en la Universitato de Kiel (Germanio).

De 1985 ĝis 1990 l ilaboris kiel komputa lingvisto, poste kiel projektestro, en la programara entrepreno BSO/Buro voor Systeemontwikkeling BV en Utrecht (Nederlando) en la esplora kaj evoluiga projekto Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT) pri perkomputila tradukado kun Esperanto en la funkcio de interlingvo.

En 1991 kaj 1992 funkciis kiel konsilisto kaj teknika estro ĉe BSO/Language Technology BV en Baarn (Nederlando).

En 1992 ekoficis kiel profesoro ĉe la faka universitato de Flensburg (Germanio), komence en la studprogramo pri teknika tradukado, nun en la studprogramo pri internacia faka komunikado.

En 2002 elektiĝis estrarano de la Germana Societo pri Tradukologio (DGÜD).

En 2006 elektiĝis estro de la sekcio pri tradukologio de la Germana Asocio pri Aplika Lingvistiko (GAL).

En 2007 habilitiĝis pri Aplika Lingvistiko en la Teknika Universitato de Chemnitz (Germanio).

[En la sekva kariero de IpI ni prezentos la liston de la publikigaĵoj de Klaus Schubert].

11.2 Viktor Petroviĉ Grigor'ev (1925-2007)

La 9-an de februaro 2007 en Moskvo forpasis pro koratako la iama membro de la Akademio de Esperanto *profesoro d-ro Viktor Petroviĉ Grigor'ev*. Li estis tre aŭtoritata rusia lingvisto, aŭtoro de dudeko da libroj kaj tricento da artikoloj (i.a. redaktoro de Esperanto-rusa vortaro de Bokarjov): http://www.ruslang.ru/bibl/grigor_ev.pdf

Li faris tre multe por popularigi interlingvistikajn kaj esperantologiajn ideojn inter sovetiaj kaj rusiaj lingvistoj.

Jen ni prezentas elekton de la interlingvistikaj publikigaĵoj de V.P. Grigor'ev.

(La ciferoj enkrampe, se trovite, rilatas al la pozicio en la listo de la publikigaĵoj de Grigor'ev en: http://www.ruslang.ru/bibl/grigor_ev.pdf , 18.6.07):

Grigor'ev, Viktor P. (1956): Nauĉnaja žizn. En: Voprosy jazykoznanija (Moskva), 11, Nr. 4, p. 158-159 (pri prelego de Evgenij A. Bokarev, kiun li faris pri Esperanto en la Akademio de Sciencoj de USSR)

–(1957): V institute jazykoznanija AN SSR. II. En: Voprosy jazykoznanija (Moskva), 11, Nr. 2, p. 169-171. (Diskutado pri internacia lingvo en la Akademio de Sciencoj de USSR)

–(1960): I.A. Boduën de Kurtenë i interlingvistika. En: Bernštejn, S.B. (Red.): Boduën de Kurtenë (k 30-letiju so dnja smerti). Moskva: Izdatel'stvo AN SSSR, p. 53-66. (Nr. 16)

–(1960): Onsovnye zadaĉi interlingvistiki. In: Pitannja prikladnoj lingvistiki. Tezi donovidnej mižvuzivskoj naukoj konferencii 22-28 veresnja 1960 roku, p. 3-7.

–(1963): Kultura jazyka i jazykovaja politika. In: Voprosy kultury reĉi, IV, Moskva, p. 5-20. (Nr. 27)

–(1965): On internacional'noj jazykovoj forme. In: Problemy sovremennoj filologii, Moskva, p. 94-97. (Nr. 38).

–(1966): O nekotorych voprosach interlingvistiki. In: Voprosy jazykoznanija, XV, Nr. 1, p. 37-46. (Nr. 20).

–(1971/72): Some questions in interlinguistics. In: Eco-logos, vol 17 (1971), Nr. 62, S.2, 15-16; vol. 18 (1972), Nr. 63, S. 3, 15-16; Nr. 64, S. 14-16 (Nr. 70).

–(1974): Ot redaktora. In: Bokarov, Evgenij A. : Ĕsperanto-russkij slovar'. Moskva : Izd. Sovetskaja ĕnciklopedija, p.7-17.

–(1974): Iskusstnennye vspomogatel'nye meždunarodnye jazyki kak interlingvistiĕeskaja problema. En: Isaev, Magomet I. (Eld.): Problemy interlingvistiki. Tipologija i evolucija meždunarodnych iskusstvennych jazykov. Moskva: Nauka, p. 35-54. (Nr. 91).

–(1993): Interlingvistika. En: Grigor'ev, V.P. (Red.): Iz proŝlogo lingvistiĕeskoj poetiki i interlingvistiki. Mosva: Nauka, p. 134-160.

11.3 Honorigo por Fabrizio Angelo Pennacchietti

La festlibro

La itala lingvisto, arabisto kaj interlingvisto, *Dr. Fabrizio Angelo Pennacchietti*, profesoro ĕe la universitato de Torino, antaŭ nelonge estis honorigita per festlibro⁵:

Loquentes linguis. Studi linguistici e orientali in onore di Fabrizio A. Pennacchietti. Linguistic and Oriental Studies in Honour of Fabrizio A. Pennacchietti. Lingvistikaj kaj orientaj studoj honore al Fabrizio A. Pennacchietti. A cura di/edited by/redaktis Pier Giorgio Borbone, Alessandro Mengozzi, Mauro Tosco. Wiesbaden: Harrassowitz, 2006, 751 p.

La libro enhavas jenajn interlingvistikajn kontribuojn:

<i>Sergio Baldi</i>	L'esperanto e la lingua hausa
<i>Vĕra Barandovskĕ-Frank</i>	Internaciaj lingvoj en interreto
<i>Helmar Frank</i>	La Sibia Programo de Eŭrolingvistiko
<i>Federico Gobbo</i>	L'esperanto e la traduzione automatica: storia, risultati e prospettive esperantologiche dell'approccio statistico
<i>Carlo Minnaja</i>	Un poeta in esperanto: Edmond Privat
<i>Giorgio Silfer</i>	Armand Su: chinois de naissance, poĕte en esperanto, italien par inspiration
<i>Ana Vrajitoru</i>	Malnova strukturo de la relativa propozicio en araba kaj rumana

Biografio

F.A. Pennacchietti naskiĝis en Torino 14.12.1938, esperantistiĝis en 1954, studis proksim-orientajn lingvojn kaj kulturojn ĕe la Universitatoj de Romo kaj Munkeno. Ekde 1970 ĝis 1972 li instruis Semidan Filologion ĕe la Universitato Ca' Foscari en Venecio. Paralele ekde 1970 ĝis 1979 li gvidis samteman kurson ĕe la Universitato de Torino, kie li fariĝis etata plenrajta profesoro ekde 1980. Ekde 1995 li gvidas komisiite oficialan kurson pri Interlingvistiko kaj Esperantologio. Li prezidas la Torinan Esperanto-Centron "Prof. Giorgio Canuto" ekde 1975, instruis Esperanton ĕe la torina Popola Universitato ekde 1975 ĝis 1998, prezidas la Italan Esperanto-Instituton ekde 1978. Li estas fondinta membro (1983) de A.I.S. - Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, kaj korespondanta membro de la Akademio de la Sciencoj de Torino ekde 1998. Li kunorganizis en Torino la 62an Italan Kongreson de Esperanto en aŭgusto 1991.

Science li okupiĝis pri greka epigrafiko, semida epigrafiko, semida historia kaj kompara lingvistiko, aramea dialektologio, proksim-orienta toponimio, proksim-orienta kompara literaturo.

⁵ Mi dankas al *Vĕra Barandovskĕ-Frank* pro la disponigo de la libro..

Sciencaj artikoloj pri interlingvistiko kaj esperantologio:

- (1) “La prepozicia sistemo de Esperanto”, *Esperantologiaj Kajeroj I* (Universitá Eötvös Loránd), Budapest 1976, pp. 137-153.
- (2) “La nominaligo en Esperanto kaj provo ĝin formalizi”, *Paderborner Arbeitspapiere*, 38 (1978), pp. 15-50 (2. Werkstattgespräch “Interlinguistik in Wissenschaft und Bildung”, Institut für Kybernetische Pädagogik, FEoLL, Paderborn, D).
- (3) “La internacieco de Esperanto kaj la karaktero de la hindeŭropaj elementoj en ĝi, *Horizonto* (Zaragoza), 13 (1978), pp. 5-9 Itala: “L’internazionalità dell’Esperanto e il carattere degli elementi indo-europei di esso” de Cristina de’ Giorgi en: *L’esperanto e i giovani* (a cura della Gioventù Esperantista Italiana, Quaderni K 11), *L’esperanto*, 9 (1982), pp. 16-23, kaj en: *La comunicazione internazionale tra politica e glottologia. L’Esperanto cento anni dopo*, Milano 1987: Marzorati Editore, pp. 129-139: pola.: “Miedzynarodowosc esperanta i charakter indoeuropejskich elementow w nim zawartych”, *Miedzynarodowa komunikacja jezykowa* (Uniwersytet Łódzki), Łódz 1983, pp. 223-235].
- (4) (und M. NORDIO) “La predikativo: teorio kaj didaktiko por elementlerneja lingvoorientiga instruado”, *Paderborner Arbeitspapiere* (Institut für Kybernetische Pädagogik, FEoLL, Paderborn, D), 57 (1980), pp. 146-164.
- (5) “La determinazione con e senza articolo in Esperanto”, *Miscellanea Interlinguistica* (1a Internacia Konferenco pri Interlingvistiko, Budapest 24-28.07.1978, Eötvös Loránd T.E., Tankönyvkiadó), Budapest 1980, pp. 400-412. [en Esperanto: “La determino per kaj sen artikolo en Esperanto”, en R. HAUPENTHAL (Red.), *Li kaj ni. Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien*, La Laguna 1985, pp. 271-285]
- (6) “La Pazitelegrafio (1851) de Graziadio Isaia Ascoli”, *Paderborner Arbeitspapiere* (Institut für Kybernetische Pädagogik, Paderborn, D), 64 (1981), pp. 153-158.
- (7) “Ne hindeŭropaj trajtoj de la Internacia Lingvo”, *Kibernetiko de la homa lingvo kaj aliaj internacilingvaj aktoj de la IXa Internacia Kongreso de Kibernetiko Namur 8-13 septembro 1980*, *Paderborner Arbeitspapiere*, 63 (1981), pp. 92-95 [Nachdruck in: H. FRANK, YASHOVARDHAN, Brigitte FRANK-BÖHRINGER, *Lingvo-kibernetiko / Sprachkybernetik*, Tübingen 1982 : Gunter Narr Verlag, pp. 92-95, 181-182].
- (8) “Modelo de profunda strukturo de genitivaj sintagmoj en pluraj lingvoj”, *10ème Congrès International de Cybernétique, Namur, 22-27 Août 1983, Simposio VII, Lingvo-kibernetiko*, Namur 1983, pp. 25-37.
- (9) “La semantikaj kaj fonetikaj rilatoj inter la vorto *kybernêtês* kaj la vorto *governor*”, *grkg/Humankybernetik* (Gunter Narr Verlag, Tübingen), 25/2 (1984), pp. 67-71.
- (10) “Kaŝaj kaj malkaŝaj refleksivaj prefiksoidoj en Esperanto”, *Planlingvistiko* (Genève, CH), 10 (1984), pp. 1-4; e *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo. II. Esperantismo*, La Laguna 1987, pp. 539-543.
- (11) *Due vite, due lingue* (Yitzhak Perelman alias Eliezer Ben-Yehuda, 1858-1922, e Ludovico Lazaro Zamenhof, 1859-1917), Vercelli 1987 (Trentennale del Gruppo Esperantista Vercellese. Centenario dell’Esperanto, 31 maggio 1987). Represita okaze de la kvardekjariĝo de la Esperanto-Grupo de Vercelli, Vercelli 5.10.1997.
- (12) “C’è un modo nuovo di parlare europeo?”, in *Atti di Proscuola ‘86, Rassegna del libro di testo scolastico e delle attività didattiche, Verona 19-23 Febbraio 1986*, Verona 1987, pp. 39-40.

(13) “L’Esperanto e le lingue minoritarie”, in N. SALETTI (Red.), *Le lingue tagliate. L’Esperanto e le lingue delle minoranze etniche*, Milano 1987 (*l’esperanto* n. 8/9, Agosto-Settembre 1987), pp. 29-31.

(14) “Kontribuo al la historia topografio de la Eŭfrata kaj Habura valoj en la romana epoko. Lokalizo de la Arameaj loknomoj menciitaj en la armearkivo de Dura-Europos (III-a jc. p. K.)”, *Aktoj de Internacia Akademio Comenius*, Volumo 1, Pekino 1992: Ĉina Esperanto-Eldonejo, pp. 30-37.

(15) “Kristanaj kaj judaj versioj de Islama legendo”, en Fabrizio PAGLIAROLI, *Esperantologia forumo 2000: Tekstoj. Materiali di Interlinguistica ed Esperantologia 13*, Milano 2000: CO.ED.ES, pp. 1-14.

(16) “Propono klasifiki la prepoziciojn de esperanto”, in: Amri Wandel (red.), IKU – Internacia Kongresa Universitato, 59° sesio, Florenco, Italio, 29 julio – 5 aŭgusto 2006, UEA – Universala Esperanto-Asocio, 2006, pp. 68-83.

Libroj (ekster interlingvistiko)

Studi sui pronomi determinativi semitici, Napoli 1968 : Istituto Universitario Orientale di Napoli. [Semidaj pronomoj]

Testi neoaramaici dell’Iran settentrionale, Napoli 1971 : Istituto Universitario Orientale di Napoli. [Tekstoj el Irano en nordorienta kaj novarama lingvoj]

kun M. TOSCO: Testi neoaramaici dell’Unione Sovietica, Napoli 1991 (Istituto Universitario Orientale di Napoli, Dipartimento di Studi Asiatici, Series Minor XXXV). [Tekstkolekto en nordorienta kaj novarama lingvoj, publikigitaj latinalfabete en Sovetunio]

Il ladrone e il cherubino. Dramma liturgico cristiano orientale in siriano e neoaramaico, Torino 1993: Silvio Zamorani ed. [Prakristana dramo pri la „bona“ rabisto antaŭ la pordo de la Paradizo]

Susanna nel deserto. Riflessi di un racconto biblico nella cultura arabo-islamica, Torino 1998: Silvio Zamorani Edit. [Temo el la biblio, la libro Daniel]

Three Mirrors for Two Biblical Ladies. Susanna and the Queen of Sheba in the Eyes of Jews, Christian, and Muslims, Piscataway, NJ, 2006: Gorgias Press. [Bibliaj virinoj en la juda kaj islama literaturoj]

12 Pola radio daŭrigas

La parolata vorto estas tre grava por la evoluo de Esperanto. Modelan rolon ĉi-rilate ludis kaj feliĉe plu ludas Radio Polonia. Rezulte de lavango da protestoj kontraŭ la planita ĉesigo de la Esperanto-disaŭdigoj de Radio Polonia, la stacio tamen daŭrigadas siajn emisiojn, kvankam kun reduktitaj fortoj. La programoj estas aŭskulteblaj en bonega kvalito nur en la reto:

<http://www.polskieradio.pl/eo/> kaj

<http://www.polskieradio.pl/podcast/39/podcast.xml>. Reagu al: esperanto@polskieradio.pl .

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvo-Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantico.org . ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 633, fakso:+ 49-30-54 56 742, dblanke.gil@snafu.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur disketo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantaj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas.
